# BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO- INSTITUTO

**Albana proverbo:** *Ne estas surdulo pli surda ol la homo kiu ne volas au'di.* (Sudo)

**Nr 53 Junio 2004**
**Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio**
**Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758 (Bardhyl , sekretario); +355 4 363360 (Rita , kasistino)**
**Rete:** pistolii@email.com (Vasil Pistoli); selimib@albmail.com (Bardhyl Selimi); adoci@gmx.de (Artur Doçi) ; shhasani@albmail.com (Shaban Hasani); hamotto@aul.com.al (Martha Otto) **;** beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj) ; matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi); sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti); (mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri); dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole); ervincanga@yahoo.com

**Retpag'o** : http://www.esperantio.tk

You can access the group's web features using the link below.
http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/

You can access the group's Management page using the link below.
http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage

**ENHAVO**

**Organizativaj aferoj**
Financo
Sciigo de Atilio
ILEI-Konferenco en Slovakio
**AIS, Studado**
El la Regularo de AIS
AIS Bulgario
Sciigoj de Abdrew Grzebowski
Euroscola
**Niaj interrilatoj amikaj**
Vizito de samideano David Kelso
Intervjuo kun li
Prelego de david Kelso
**Propagando**
Valora interesa uzado de E.
Informoj de Henri Masson
Kio estas Skype
Kurso en Israelio
G'emelaj urboj
**Nekrologioj**
Forpasis Petko Arnau'dov

Forpasis Oszkar Printz
Forpasis Georges Lagrange
**Politiko**
Klubo de balkanaj politikistoj
Gejunuloj el Balkanio renkontig'as
**Albanaj eminentuloj**
125-jarig'o de brilanta dramaktoro
**Kanzonoj kaj humoraj'oj**
Kanzono pri patrinoj
Kanzono pri paco
Albanaj humoraj'oj
**Sciigoj**
El Verda Partio
El islama e-isto
Ofero turusma de Esperantotur
Oferto turisma el Rumanio
Sciigo de Boj'idar Leonov
**El diplomlaboraj'oj de nia gestudentoj**
Kodikoj de Berat

## ORGANIZATIVAJ AFEROJ

**Pagis la kotizon**
Gjergji Gusho 500 L (200 +300)

**Sciigo de Johan Derks**
From: Johan Derks [kasisto@lingvo.org]
Sent: Monday, April 12, 2004 5:12 PM
Kara kolego-kasist(in)o,
Je la sesa de marto mi sendis al vi inviton alighi al Europa Esperanto-Unio. Char mi ne ricevis reagon, mi sendas nun al vi specialan inviton. Mi memorigas vin pri la decido de Gotenburgo: la kotizo por membranta landa asocio estas minimume po 0,50 euro por asocia membro kaj minimume po 0,25 euro por observanta asocio. Char via lando ne estas membro de Europa Unio, vi povas farighi nur observanta asocio. Lau la jarlibro 2003a de UEA la nombro da membroj de via asocio estas 152. Se vi konsideras observanteco, la kotizsumo altas 38 eurojn. Char estinte pruvighis, ke tiuj membronombroj ne estas ghisdataj au ke ili inkluzivas kategorion de membroj, kiuj ne estu konsiderataj kiel ordinaraj membroj, char ili ne pagas plenan kotizon al via asocio, mi invitas vin, pagante, mem prezenti al mi korektitan kalkulon de la kotizo shuldata. Vi pagu/donacu al la speciala konto "J.H. Derks Europa Esperanto-Unio VZW io": (NL91RABO0)159156114 (loko: IJsselmuiden; BIC-kodo RABONL2U) au al la konto de UEA: NL66 ABNA0 4260 51599 (loko: Rotterdam; BIC-kodo ABNANL2R) sub la kodo eece-p . Bonvolu noti, ke la bankkonto de Flandra Esperanto-Ligo: BE66 0000 2653 3843 ne plu validas por kotizpagoj au donacoj al Europa Esperanto-Unio/Brusela KomunikadCentro. FEL tenas almenau 14.159,46 eurojn de EEU, kiujn ghi – ekde januaro 2004 - rifuzas disponi al la kasisto de EEU. Tiu monsumo estas kun multe da shvito kaj malavaro kolektitaj el inter la esperantistaro. Sincere via, Johan Derks, kasisto/sekretario de EEU . PS: Bonvolu indiki al mi, chu selimib@albmail.com reprezentas la nomon/adreson de la kasist(in)o de Albana Esperanto-Ligo kaj, se ne, al kiu mi turnu min por invito al aligho.

**Sciigo de Atilio Orellana Rojas**
**From:** Atilio ORELLANA ROJAS [iei001@tiscali.nl]
**Sent:** Wednesday, April 14, 2004 12:27 PM
Kun tre granda bedawro mi devas diri, ke ni ne povas akcepti Shaban Hasani kiel komitatanon. La afero estas, ke nun ni devas kontroli, cxu efektive la persono prezentata kiel komitatano estas aw ne membro de ILEI kaj li bedawrinde ne estas membro. Membron ni konsideras tiun, kiu pagas kotizon. Vere mi tre bedawras tion.
Tamen estus ege malagrable, se Albanio restas sen komitatano. Cxu vi mem povus igxi komitatano? Vasil kaj vi estas la solaj, kiuj membras en ILEI kaj viaj kotizoj estas kovrataj de la Koleghelpa Kaso. Tiel, do, vi ambaw estas membroj de nia organizo. Se vi aw Vasil pretas esti la komitatano, mi resendos al vi perposxte alian formularon por plenigo. Amike, Atilio

**ILEI- Konferenco en Slovakio**
Kiel jam sciite, la c'ijara konferenco de ILEI okazos ne en C'inio sed en Bratislavo , Slovakio, ekde 14-21 au'gusto 2004.
Lau' IPR nr 2 , 2004 la c'eftemo de Konferenco estos "Kultura kaj lingva diverseco en edukado".

Albanoj bezonas enirvizon por Slovakio sed la slovakaj samideanoj anoncis ke ili povas arang'i vizprocedurojn nur se ni alig'us g'is majfino. Do, estas neeble partopreni konferencon kaj postkonferencon en C'eh'io, flanke de albanoj.

**Vasil Pistoli**

**Estrarkunsido en Sarajevo**

Ekde 19-21 marto, c'aim lau' la IPR,2,2004, okazis la estrarkunsido de ILEI je la temo: ekonomio de ILEI, projektoj Interkulturo kaj Flugiloj de malfacila Vento, Konferenco 2004, membraro kaj sekcioj, informado (papera, reta, dum arang'oj), eksteraj rilatoj (UEA, UNESKO, FIPLV) kaj plua laboro.

**Shaban Hasani**

## AIS, STUDADO

**Demando de Egli Brati kaj respondo de AIS**

On Tue, 20 Apr 2004, Egli Brati wrote:
Estimata profesoro.
Oni diris al mi ke okazos sesio en Bydgoszcz? cu vi scias ke tio sesio validas por tiuj kiuj volas magistrigxi,temas pri poentoj kaj fakekzameno okazas au ne? dankon pro via helpo
Egli Brati

Respondo:
Kara bakalauro Brati, en Bydgoszcz la studumo organizos studadsesion 24.04-2.05.2004. Dum tiu studadsesio estas antauviditaj 6 kursoj, kiuj estas agnoskeblaj ankau kiel AIS-studado. Krome okazos c^i-jare du grandaj arang^oj, kiujn organizos AIS mem, nome:

1) SUS 27. SUS 27 okazos de 2004-08-29 (dimanc^o) al 2004-09-04 (sabato) en Komarno(SK) , apud la Slovaka-Hungara landlimo. Loka organizanto : Prof. Eva POLAKOVA (polakova@in.slovanet.sk)

2) BUS 5 , BUS 5 okazos fine de septembro 2004 en Lublin (Pollando) Loka organizanto : Prof. Witold Stepniewski (stepw@fenix.pol.lublin.pl)

Dum ambau arang^oj eblas kolekti studunuojn, kaj laubezone estos organizataj fakekzamenoj. Partoprenontoj bv. anonci sin al la loka organizanto kaj al la sekretario de AIS, Prof. Foessmeier (Reinhard.Foessmeier@epost.de)

Elkore salutas Dieter Quednau

**El la regularo de AIS**

**From:** Studium [stud@esperanto-turismo.com]
**Sent:** Wednesday, May 19, 2004 5:32 PM
**Subject:** 5 BUS kaj studunuoj

Altestimataj AIS-Profesoroj1

Ni dankas ricevitajn laste informojn de Prof. R.Fosmeier pri la 27 SUS – ni jam sendis la informojn al cxiuj ISTK-AKB gestudentoj kiamamniere ili aligxu kaj rezervu tranoktojn en studenta domo en Komarno. Ni ecx presis cxiujn ret pagxojn pri la 27-SUS tiel, ke tiuj studentoj, kiuj ne havas Internet povas legi cxion la 22-an de majo en Bydgoszcz. Prof. Stępniewski informis, ke la Lublina Festivalo de Scienco dauros en Lublin gxis la 26-a de septembro, tial, por ne konkurenci, post la 5 BUS en Lublino(24-28.09) ni okazigus nian 26 EKB-Sesion nur dum 29-30 septembro por ebligi poste vojagxon al ARKONES (1-3 oktobro) en Poznań. Ni invitas

cxiujn al. Bydgoszcz por 29-30 septembro 2004! Ni esperas, ke iu el AIS-Senatanoj post Lublin povos veni al Bydgoszcz la 29/30 de septebro por inauguri studjaron 2004/2005 de ISTK/AKB Bydgoszcz ka allogi novajn AIS-gestudentojn. Gxis nun aligxis gestudentoj el 12 landoj, bedaurinde, la plej multaj ne veturos al Lublin. Nun ni urgxe bezonas, (plej bone gxis sabato - la 22-a de majo) informojn pri partoprenkondicxoj dum 5 BUS en Lublin dum 24-28 de septembro 2004, cxar poste ni havos kontakton kun la gestudentoj nur septembre. Tamen, ni ankorau demandas - cxu ne pli bone estus okazigi 5 BUS en Lublin dum 24-26 de septembro kaj dum 27-30 de septembro en Bydgoszcz (same kiel San Marino-Rimini)? Ni dankas ankau pri ricevitaj proponoj pri regularsxangxoj por AIS studado. Lau ni estas ebla, ke AIS-gestudantoj atingu 180 studunuoj por bakalaurigxi kaj pliaj 120 por magistrigxi cxe AIS do kune 300, meze 60-STU po jare. Tamen AIS devuss ankau ebligi, ke cxiujare dum AIS-Sesioj eblus kolekti almenau 60 STU. Se ne estus kalkulataj studunuoj de ISTK-studado pri turismiko, ne eblus kolekti la necesajn studunuojn. Ni komprenas, ke AIS volas nur valorigi kursojn de AIS-sciencistoj, sed cxar AIS ne havas suficxe da sciencistoj pri tursimiko, ni devas dungi aliajn fakulojn pri turismo, ke ni povu realigi ne nur AIS-programon pri turismiko, sed ankau kursojn de ISTK pri turismiko, ke gestudentoj povu ricevi ankau la polajn ISTK –diplomojn rekonatajn de Pola Ministerio de Edukado. Tiamaniere eblas, ke niaj gestudentoj akiras dum 5 studjaroj la polan diplomon kaj du AIS diplomoj de bakalauro kaj magistro. La 'administraj" kaj "rezultaj" studunuoj estas tute malklaraj por gestudentoj kaj la "studunuoj" estas cxefe por studentoj, ne por AIS-profesoroj, do, por la studentoj valoras komprenigi kaj faciligi la studunuo-sistemon. Ekzemple valorigi la studunuoj lau la sciencaj gradoj de kursgvidantoj:
1 STU de tiuj, kiuj ne estas AIS-prelegantoj
2 STU por Asci
3 por ADoc,
4 por AProf kaj 5 STU por Oprof.
Alia ebleco estus kalkuli studunuojn lau nombro de horoj, tiam UNU STUDUNUO estus akirebla post 8h kurso de AIS-profesoroj, post 10h kurso de Adoc, post 12 h kurso de Asci au post 16h kurso de aliaj ne AIS-prelegentoj. Ambau proponoj estus kompreneblaj por AIS-gestudentoj kaj la AIS-kursoj estus valorigitaj lau AIS- sciencaj gradoj.
Ni estos dankemaj nome de niaj gestudantoj, ke vi pli komprenigos kaj malkomplikigos la AIS-regulojn pri studado kaj ekzamenado.
Estimplene , Regina kaj Andrzej Grzebowski , AIS-Klerigejo Bydgoszcz

- Estimataj kaj karaj kolegoj prezidinto Galor kaj prezidanto Stepniewski! Kun granda ghojo mi ekscias el la retcirkulero de la Internacia Klubo pri la sukceso de la renkontighoj en Bydgoszcz kaj precipe pri la transdono de la torcho de AIS Pollando de vi, kolego Galor al vi, kolego Stepniewski! Mi dankas vin,kara kolego Galor, pro via plurjara klopodego "ankau formale vivteni" nian polan asocion, kaj mi petas vin, maksimume faciligi al via posteulo transpreni la funkcion. Al vi, kara kolego Steniewski, kaj al ni chiuj mi deziras bonan sukceson en via prezidanteco kun malmultaj zorgoj kaj chagrenoj! Ghis revido en la septembro - laueble en Komarno, plej malfrue en Lublin - via H.Frank

## 29 Esperanto Tagoj de Bydgoszcz

Tradicie en Bydgoszcz dum 23 de aprilo gxis 2 de majo okazis lauvicaj 29 Esperanto Tagoj de Bydgoszcz, cxifoje kune kun 25 Sesio de AIS Klerigejo Bydgoszcz (AKB). La E-tagoj dauris

kadre de Tagoj de Bydgoszcz dum 19 aprilo – 3 majo 2004 okaze de 658 datreveno de urbaj rajtoj de Bydgoszcz – nun kun preskau 400 mil logxantoj. Tio lige ankau kun multaj arangxoj okaze de eniro de Pollando al Europa Unio donis al partoprenantoj amason de interesaj arangxoj. Tamen por pli ol 50 gestudentoj el 10 landoj de Europo, Afriko kaj Azio de ISTK en Bydgoszcz la plej gravaj estis E-kursoj kaj E-ekzamenoj. Cxi-foje kursojn gvidis OProf.Remigiusz Mielcarek pri Karaiboj, Suda Ameriko kaj Sudorienta Azio, AProf. Aleksandra Kowalczyk gvidis Seminarion por estontaj bakalauroj kaj magistroj de AIS, Asci Augusto Casquero pri "Hispanio en Europa Unio", Asci Ewa Bondar pri "E-instruado lau Cseh-metodo", Asci Regina Grzêbowska "Kompendio por vojagxgvidantoj", Asci Andrzej Grzêbowski pri "Turismo en la mondo", Marcel Delforge pri "Plilargxigo de Europa Unio", kaj pri "Esperanto kaj franca lingvoj", Mara Timermane pri "Latvio en Europa Unio", Moliere Ngangu pri "Turismo en Afriko", Adriana Witucka pri "Arta ceramiko". Cxiuvespere okazis E-ekzamenoj por gestudentoj de lauvicaj studjaroj, kiuj estis altnivelaj kaj ege interesaj kiam gestudentoj el 8 landoj: Albanio, DR Kongo, Latvio, Litovio, Mongolio, Pollando, Tanzanio kaj Zimbabvo defendis siajn diplomverkojn antau la ekzamenkomisiono el 6 landoj: Belgio, Hispanio, DRKongo, Litovio, Latvio kaj Pollando prezentante ne nur bonan konon de Esperanto, sed interesajn diplomverkojn pri turismo kaj kulturo. Okazis ankau fakekzameno de AIS, kiun partoprenis 15 kandidatoj por septembre bakalaurigxi kaj magistrigxi cxe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS).<?xml:namespace prefix = o ns = "urn:schemas-microsoft-com:office:office" /> Fine de la E-kursoj gvidataj pri Europa Unio okazis konkursa ekzameno kun premioj – senpagaj vojagxoj al 14 Europa Esperanto Forumo dum 11-18 de junio 2004 en Benelukso kaj Parizo kun vizito en sidejo de Europa Unio en Bruselo. La 30-an de aprilo okaze de eniro de novaj 10 landoj al Europa Unio Augusto Casquero de la Cruz preparis por cxiuj la faman valencian "paella" kun "sangrija". Poste cxiuj vagadis tra malnova Urbo por spekti la arangxojn de Tagoj de Bydgoszcz. Bonguste estis preparita rekorde en 37 mil da porcioj senpaga regiona supo "Zurek Kujawski", kies cxefa kuiristo estis Konstanty Dombrowicz – Prezidento de la Urbo Bydgoszcz, samtempe prezidanto de nia Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, pri kiu Vi povas multon legi en Interreto sur pli ol 100 pagxoj sub adreso: www.esperanto-turismo.com. La 26-an de aprilo okazis ankau Gxenerala Kunveno de Internacia Klubo "Esperantotur", dum kiu oni rezumis la gxisnunan agadon, planis arangxojn por 2005 jaro kaj reelektis la 11-personan Konsilion de la Klubo sub gvido de prezidanto Andrzej Grzebowski(PL) kaj vicprezidantoj Augusto Casquero (ES) kaj Liu Jianguo (CN) – pliaj informoj en la pagxo : www.esperanto-tursimo.com.

La 29-an de aprilo en tre agrabla etoso pasis renkontigxo arangxita de nevidantaj esperantistoj en Bydgoszcz. Fine la 2-an de majo okazis la Gxenerala Kunveno de Pola Societo de AIS, kiun dum pluraj jaroj gvidis ADoc Zbigniew Galor en Poznañ. Kiel la novan Prezidanton de Pola AIS-Societo oni elektis OProf. Witold Stêpniewski – Vicerektoron de Politekniko en Lublin. La sukcesa 25 Sesio de AKB helpis, ke pluraj gestudentoj, aligxadis al sekvontjara studado, aligxadas ankau novaj sudentoj – la plej multaj el Afriko kaj Azio . Pliajn informojn – la aligxkotizojn por studado en ISTK en Bydgoszcz kaj AIS, la studadprogramojn kaj enketilon por novaj studentoj Vi trovos en Internet sub kelkdekpagxoj: www.esperanto-turismo.com, elektu kaj kliku "studu".

Bonvenon en Bydgoszcz al la unika multnacia studado 2004/2005 cxefe en Esperanto de turismiko kaj kulturo - Vi studos jam en Europa Unio.

**Andrzej Grzebowski**, Vicprezidanto de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, Pollando

**El la regularo de Senato de AIS**

- Karaj gekolegoj, ni ja volas revizii nian regularon, el kiuj ne la malplej gravaj estas la Regularo pri instruado kaj studado cxe AIS (IS) kaj la Ekzamenregularo (EK) . Kiel mi jam kelkfoje skribis, mi ne vidas eblecon decidi paragrafon post paragrafo pri eblaj s^ang^oj: Mi bezonas unue superrigardon pri ebla interkonsento pri la g^enerala direkto de nia instruado kaj ekzamenado. Pro tio mi kompilis kelkajn proponojn (parte jam antaue publicitaj, parte ankau priparolitaj kun la prezidanto), kaj mi petas pritaksi, c^u vi povas aprobi ilin. Se jes, mi estus kontenta, se la G^.A. povus ilin (entute au almenau parte) ekvalidigi jam en junio.
  Post kiam mi scios, kion la G^.A. subtenas, mi povos komenci ekverki proponon por la definitiva regularo. Tamen mi avertas kontrau tro granda hasto en tiu laboro. En niaj universitatoj la regularon pri studado kaj ekzamenado verkas tuta teamo per strec^a laboro dum multaj monatoj - alikaze la rezulto ne estus kontentiga. Mi donas nun unue kelkajn punktojn el nia reta senatdecido de 2001
  (deklarita kiel akceptita de la vicprezidanto 2001-11-25) kiuj koncernas IS kaj EK kaj parte bezonas la finan aprobon de la G^.A. Due senatdecidon de SUS 26 aprobenda de la G^.A.Trie (PLEJ GRAVE) miajn novajn proponojn kaj petas pri komentoj kaj voc^donado dum la sekvonta G^.A. Krome mi petas Reinhard prezenti la tutaj^on en la TTT-ejo, kiun li preparis por la diskutoj pri la regularo (bedaurinde mi forgesis la URLon) . Mi sendas tiujn proponojn ankau al niaj filioj kaj klerigejoj, (ankau se ili parte ne voc^donos dum la G^.A.), por ke ili donu siajn opiniojn lau iliaj instru-spertoj kaj jam sciu, kiuj s^ang^oj eventale okazos.
  I) EL LA RETA SENATDECIDO
  3) C^ar dum BUS ne devas okazi senatkunsido, la rolon de la senato en paragrafo 5.2 de la ekzamenregularo: 5.2 La senato alvokas el cxiuj 6 sekcioj por la dauxro de sia dejxortempo po unu konstantan membron en la ekzamenoficon; po unu plua estu elektita komence de SUS el inter la SUS-partoprenantaj docentoj.
  transprenu dum BUS kunsido de la partoprenantaj efektivaj membroj. La postuloj de la paragrafoj 6.1 g^is 6.4 estu plenumitaj tiomgrade, kiom eblas.
  4) Al paragrafo 10.1 de la ekzamenregularo: 10.1 La kandidato interkonsentu pri temo de scienca laborajxo por nivelsxtupo 1-3 kun patronanto, kiu estas efektiva membro de AIS, antauxvidas surbaze de la gxisnuna faka laboro de la kandidato sukcesplenan pritrakton de la temo, pretas poste verki ekspertizon pri la laborajxo, kaj -- kaze de disertacio -- pretas sercxi kompetentan duan ekspertiziston. Ankaux eblas, ke la kandidato sercxas por sia jam preta laborajxo inter la efektivaj membroj de AIS ekspertizistojn.Estu aldonate: La patronanto rajtas bazi sian ekspertizon sur propono de prizorganto, kiu estas docento de AIS au de universitato. Tiu prizorganto devas esti menciita en la verko kaj invitata kiel (c^eestanta) membro de la koncerna ekzamenkomitato, ec^ se li ne estas ano de AIS.
  5) En paragrafo 6.4 de la ekzamenregularo: 6.4 Se la kandidato proponas por la ekzamenkomitato * profesorojn de la sekcio fleganta la kernfakon, kaj se ili pretas partopreni en la ekzameno, tiam la propono estas akceptenda tiomgrade, kiom eblas sen malhelpo por plenumi la aliajn preskribojn pri la konsisto de la ekzamenkomitato la linio kun * estu anstatauata per * fake kompetenta docento [en singularo !] de AIS
  8) La kostoj de la ekzamenoj en la 4 s^tupoj kaj la 2 tipoj (adapta adopto kaj originala) estu fiksitaj lau la kotizregularo en kombino kun la senatdecidoj

de Freising (tio signifas, ke anstatau la variablaj registrig^kostoj menciitaj en la apendico de la kotizregularo estas postulata fiksa sumo de 0.5 AKU). Al tiuj fiksaj kostoj povas aldonig^i nur evetualaj malfruig^kotizoj au komunikad-eduka kontribuo. La fiksaj kotizoj estas diskonigataj en TTT. Por c^iu studento estas garantiate, ke por li la kotizoj ne kreskos dum la validecperiodo de lia studenta legitimilo.

II) SENATDECIDO DUM SUS 26

La senato rekomendas al la G^enerala Asembleo preskribi per la reviziotaj regularoj, ke finstudinteco sur nivelo inter du niveloj difinitaj por la kvar gradoj de AIS (ekzemple diplomo de germana fak-altlernejo, kiu estas pli proksime al magistreco ol al bakalaureco) estu adapte adoptebla sur la pli alta nivelo, se la kandidato au akiras adekvatan kvanton da kromaj studunuoj (lau decido de la ekzamenofico, ne malpli ol 10 kaj ne pli ol duono de la kvanto necesa por originala akiro de la celata grado) au finis la studon, kies adaptan adopton li celas, per tre bona (10/10) au almenau bona (9/10) rezulto.

III) PROPRAJ PROPONOJ

1) Studento de AIS rajtas ekzamenig^i - dum la validecperiodo de sia studenta legitimilo - post kiam li plenumis la kondic^ojn (financajn kaj aliajn), kiujn postulis la regularoj de AIS dum la tago de lia studentig^o. ( RIMARKO: Tio tago estas notita sur la legitimilo kaj registrita en la datenbanko de la klerigofico kiel "eldon-dato") ( Plua rimarko: Aliaj s^ang^oj de la ekzamenregularo, ekz. nombro de komitatanoj, estu c^iukaze aplikataj [ Do la sekvontaj proponoj ne devige validas por studentoj, kiuj jam nun havas studentan legitimilon kaj ekzamenig^os antau ties eksvalidig^o ]

2) AIS strebas adapti la ekzamenkondic^ojn al la reguloj de la Bologna-procezo. Tio signifas, ke a) Por la kompletigo de la studado estos agnoskeblaj nur kursoj de agnoskitaj altlernejoj, kiuj estas finitaj per sukcesa kursfina ekzameno. b) Studunuo de AIS estos egaligita al ECTS-poentoj. Tio signifas, ke unu studunuo respondos al studenta laboro de 25-30 horoj po 60 min. (inkl. c^eeston de kurso, antaupreparadon, memstaran ripetadon, verkadon de traktatoj, legadon de literaturo, laboron c^e komputilo, solvon de ekzercaj taskoj, kursfinan ekzamenon) c) La amplekso de studado estos - por bakalaureco 180 "administraj" studunuo - por magistreco 120 "administraj" studunuoj (ambau inkl. difinendan amplekson de studunuoj por la studfina verko)

3) Por la unua s^tupo de la adapto - valida ekde 2004-06-12 - (t.e. valida por studentoj, kiuj studentig^as ekde 2004-06-12) estas decidite: a) Por la kompletigo de la studado estas agnoskeblaj nur kursoj en agnoskitaj altlernejoj, kiuj estas finitaj per sukcesa kursfina ekzameno, au estas atestitaj kiel "finitaj kun sukceso". Puraj partoprenatestoj ne estas agnoskeblaj. b) Por la bakalaura ekzameno la kandidato devas esti kolektinta studunuojn en amplekso de almenau 5 administraj kaj 100 rezultaj studunuoj. c) Por la magistra ekzameno la kandidato devas esti kolektinta studunuojn en amplekso de almenau 60 administraj kaj 120 rezultaj studunuoj - aldone al tiuj konsumitaj por la bakalaura ekzameno d) La fakaj studad- kaj ekzamenregularoj povas la postulojn lau (b) kaj (c) pligrandigi kaj detaligi lau studobjektoj kaj disdivido inter c^ef- kaj krom-fako(j) e) La scienca grado de "Licenciato" en orienteuropaj landoj estas adaptebla c^e AIS kiel bakalaureco. (Tio validas ekz. por Rumanio - povas esti, ke en okcidenteuropaj landoj kiel Portugalio la licenciato respondas al magistro)

4) Altlernejoj agnoskitaj de AIS, tio estas altlernejoj, - kies gradoj estas adapteblaj - kies kursoj estas agnoskebla - kies docentoj rajtas oferti kursojn dum neSUSecaj

studadsesioj (kaj kies profesoroj estas alvokeblaj, sed tio apartenas al alia regularo sub la responso de alia kolego) apartenas al tri kategorioj:
a) AIS mem
b) Altlernejoj, kiuj havas specialan kontrakton kun AIS pri reciproka agnosko
c) Altlernejoj, kiuj plenumas difinitajn kriteriojn kaj pro tio estas automate agnoskataj
Pri tiuj kriterioj decidas - por c^iu lando aparte - la senato lau propono de klerigofico, de la ekzamenofico kaj AIS-anoj de la koncerna lando [ En Milano ni decidis g^enerale agnoski "s^tatajn kaj s^tate agnoskitajn altlernejojn - sendepende de la lando. Sed tio s^ajnas al mi tro mola ] Provizore c^iukaze estas agnoskebla c^iu altlernejo, kiu havas en la datenbanko de la KMK (Staendige Konferenz der Kultusminister der Laender in der Bundesrepublik Deutschland) pri agnosko kaj prijug^o de eksterlandaj sciencaj gradoj ("Anerkennung und Bewertung auslaendischer Bildungsnachweise") la kategorion "H+" [ H+ signifas: Die Institutionen dieses Typs sind im jeweiligen Herkunftsland in massgeblicher Weise als Hochschulen anerkannt (akkreditiert, attestiert u.a.) und ausgehend davon in Deutschland als Hochschulen anzusehen. La datenbanko havas la interret-adreson http://www.anabin.de/ ]
5) Dum studadsesioj de AIS kaj en klerigejoj de AIS rajtas instrui:
a) docento de AIS
b) ASci de AIS kun grado de dr.
c) sciencisto kun grado de dr. hab.
d) persono, kiu regule instruas en agnoskita altlernejo lau (VI)
[RIM: intence estas instruAs, ne instruIs]
e) ASci de AIS kun aprobo de la prezidanto au de la koncerna dekano au fakarestro
f) profesoro de la teknika au arta sektoro de AIS sole au kune kun
a) bakalauro de AIS au
b) persono kun grado de magistro
[Rim: Tiu alineo kopias la nun apartan "Regularon pri studadsesioj ekster SUS"]
6) Agnoskeblaj estas studunuoj akiritaj
a) dum studadsesioj de AIS
b) en klerigejoj de AIS
c) en agnoskitaj de AIS altlernejoj
[ Rimarko: Tio ne ekskludas, ke la ekzamenregularo postulas kelkajn studunuojn kun specialaj kriterioj - kiel ekzemple la nuna EK 4 studunuojn de docento de AIS kaj dum studadsesio de AIS, inter ili 3 dum SUS ]
7)
a) Ekzamenoj pri doktoreco kaj habilitdoktoreco eblas nur dum SUS,
b) Bakalauraj ekzamenoj eblas krome dum BUS
c) Se AIS realigas kune kun alia agnoskita altlernejo almenau unu komunan studaddirekton kun komuna fina ekzameno, tiam AIS povas organizi en kaj kune kun tiu altlernejo specialan finekzamenan sesion (FUS), dum kiu eblas fari bakalaurajn kaj magistrajn ekzamenojn. Kondic^oj por la realigo de FUS estas:
- Almenau unu ekzamenkandidato devas esti anoncita por la supre menciita komuna ekzameno.
- C^eestu FUSon almenaux 6 efektivaj aux adjunktaj membroj de AIS
- Almenau 4 docentoj de AIS au de la kunorganizanta altlernejo, inter ili almenau 2 efektivaj membroj de AIS, realigas almenau 4 kursojn en ILo. Kurso en alia lingvo ol ILo au

ne realigita de docento de AIS au la kunorganizanta altlernejo, kiu okazas en la loka kaj tempa kadro de la FUS, ne validas kiel FUS-eca, sed ja kiel AIS-kurso, se la aliaj kondic^oj por AIS-studadsesia kurso estas plenumitaj. Se estas pli da ekzamenkandidatoj ol la ekzamenkapacito permesas, tiam la kandidatoj de la komuna ekzameno havas prioritaton. d) Por bakalaura ekzameno BUS- kaj FUS-kurso povas anstataui SUS-kurson postulitan por la fina ekzameno en $ 8.4 de la IS . Por magistra ekzameno FUS-kurso povas anstataui SUS-kurson postulitan por la fina ekzameno en $ 8.4 de la IS, sed almenau unu de la 3 kursoj devas esti realigita au kunordigita de efektiva membro de AIS.

8)

Por komunaj studaddirektoj kun alia agnoskita altlernejo AIS interkonsentas kun la partnera altlernejo pri la alir-kondic^oj . En tiu kazo AIS povas rezigni pri la alikaze bezonata adapta adopto de la antaua grado c^e AIS

9)

Agnoskeblaj kursoj ricevas studunuojn, kiuj estas entjero au entjero + duono. La minimumo estas 1.0 studunuo por kurso de 8-11 lekcihoroj, 1.5 studunuoj por kurso de 12-15 lekcihoroj, 2.0 studunuoj por kurso de 16-19 lekcihoroj, 2.5 studunuoj por kurso de 20-23 lekcihoroj ktp kie unu lekcihoro = 45 min.

10) La ekzamenkomitato havas la saman grandecon por c^iuj 4 s^tupoj , nome 6 personoj. La ekzamenofico rajtas pligrandigi tiun nombron, se alimaniere la kondic^oj por la konsisto (3 lingvoregionoj, interfakeco, sufic^a reprezentateco de la ekzamenfako) ne estas plenumeblaj

11) Nec^eestantaj anoj de ekzamenkomitato ne plu ekzistu - el tio sekvas, ke prijug^anto(j) de la verko ja estu automate invitata(j) al la komitato, sed se ili ne partoprenas la koncernan sesion, tiam ili ne povas aparteni al la ekzamenkomitato.

12) La noto de la defendo de la verko ne estu la aritmo, sed la duilo (der Median - il valore mediano) de la unuopaj prijug^oj.

13) Prijug^notoj en AIS (por c^iuspecaj ekzamenoj) estas - en kazo de sukceso: 10, 9.5, 9, 8.5, 8, 7.5 , 7 , 6.5 , 6

**Sciigo de Andrew Grzebowski**

Altestimataj AIS-Profesoroj!

Cxi-lunde (17 majo) ni ekspedos al cxiuj niaj ISTK kaj AIS gestudentoj lastan antau somero leteron kaj la 22-an de majo(sabate) A.Prof. R.Mielcarek gvidos lastan cxijaran AIS-kurson pri „300 landoj de la Mondo” kaj okazos disdono de niaj ISTK-diplomoj. Poste ni kontaktos la gestudentojn nur septembre, do, urgxe ni bezonas aktualajn informojn pri AIS-agado, precipe pri 27 SUS en Komarno kaj 5 BUS . Al 27 SUS ne eblos arangxi komunan busvojagxon, cxar aligxis nur 3 studentinoj kaj lau nia scio, restis nur 6 kandidatoj por magistrigxo – do necesas ilin individue informi pri aligxkondicxoj kaj programo de la 27 SUS en Komarno. En Karlovo mi plene apogis, ke 5 BUS okazu ankau en Lublin, kune kun Bydgoszcz kaj lau peto de Prof. H.Frank mi donis la datojn en Bydgoszcz por tiam jam planitaj 30 Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kaj 26 AKB-Sesio – 24-28 de septembro 2004. Aprile atingis min informo kaj AIS protokolo, ke 5 BUS en Lublin okazu ankau dum 24-28 de septembro 2004 – tio signifas, ke kun nia AKB-Sesio en Bydgoszcz ni devas konkurenci au gxin nuligi – ankau malbone por AIS. Ni plene apogas, ke oficiala parto de 5 BUS okazu en Politekniko de Lublino sub gvido de Prof. Witold Stępniewski, tamen ne samtempe, sed plej bone post tiu labora parto en Bydgoszcz – do plej bone, ke 5 BUS okazu en Bydgoszcz dum 24-27 de septembro (27-a – Monda Tago de Turismo) kaj dum 28-30 de septembro en Lublin, kie okazu finekzamenoj de 5

BUS kaj oficialaj AIS-prelegoj kadre de Scienca Festivalo en Lublin. Tion gxuste deziras kaj pretas fari prof. W.Stępniewski kaj tio donus prestigxon por AIS. Aliel AIS riskas, ke al Lublin venos nur cx. 15 gestudentoj por bakalaurigxi kaj senbezone prof. Stępniewski zorgos mem cxefe pri administraj ekzamenaj aferoj, cxar mankas tie lokaj AIS-gestudentoj. Se 5 BUS komencigxus en Bydgoszcz dum 24-27 de septembro, suficxus, ke venu al Bydgoszcz OProf.H.D.Quednau kaj ADoc.A.Lewanderska-Quednau, kion ili jam antaue deklaris – tie eblus kune fari bonan konvinklaboron por ISTK-gestudentoj por ke ili veturu al Lublin kaj inauguri en Bydgoszcz novan studjaron ISTK/AIS. Sama opinio estis dum la Gxenerala Kunveno de Pola AIS-Societo en Bydgoszcz, la 2-an de majo. Bedaurinde nur polaj AIS-profesoroj ne sukcesas konvinki niajn ISTK-gestudentojn studi ankau cxe AIS – post Karlovo finis AIS-studojn preskau 20 AIS gestudentoj, aligxis nur 3 novaj - nun cxe ni preskau 70% studas jam eksterlandanoj, kiujn necesas persone konvinki al AIS-studado, ili mem ne volas vojagxi al Lublin , nek aliloke. Cetere por 1-3 de oktobro Poznań invitas cxiujn al ARKONES. Do, urgxe atendante Viajn findecidojn kaj informojn Kore salutas

**Andrzej Grzebowski**

**AIS Bulgario**

Jam aperis proponoj flanke de Pollando kaj Slovakio pri datoj de AIS-arangxoj auxtune, do oni devas decidi ankaux pri Bulgario.

A/ Estas peto ke oni rapide fiksu kaj certigu kelkajn arangxojn- Jen ili :

1/ kiam povas okazi renkontigxo en Burgas , ( mi promesis ankaux tie fari kurson pri polaj lingvo kaj kulturo kaj politikkulturo rilate al EU - ruslingve kaj bulgare eblas krom Ilo)

2/ certa dato pri Bulgara Studadsesio (mezo de septembro ?)

3/ kaj pri religia festivalo (Burgas, Plovdiv-Karlovo, Sofia )

4/ pri renkontigxo kun polaj kaj bulgaraj rektoroj en PL kaj en BG (temas pri intersxangxo de vizito de po du personoj- povas ecx esti en PL dum inauxguro de studa jaro en kelkaj lokoj)

5/ veturado al Ukrainio (Lvov, Kolomyja, kaj partopreno dum folkloraj kaj ortodoksaj festoj)

B/ Laux plano de AIS- Rumanio evidentigxas ke lekciistoj (en februaro, marto 04-)devas veni en diversaj intervaloj, kaj ke de Bulgario venas kol Bojagxeva kaj Prof Leonov.

Pro tio ni devas certigi ankaux kelkajn aferojn pere de reto, kaj eventuale plani la alvenon por festi la 1200j de Haag kaj 800j de Landshut (tre modeste) kaj pri restarigo de Studentaj E-Rondoj. (lastaj estroj estis Prof Leonov kaj Prof Eichhorn)

C/ Ankaux evidentigxis ke transmetado de du asocioj el Bulagario (MT kaj TEJA) ne estis bona ideo, kaj en decembre 2003-ankaux TEJE informis pri fino de agado. Pro fakto ke en Karlovo estas plano plufundigi la studadon pri jxurnalistiko, retoriko ., religia scienco kaj politikulturo eblas denove rekrei la TEJA kaj fari de gxi la laborlokon por junaj jxurnalistoj. Gxis nun jxurnalistoj de Karlovo- favore subtenis cxiujn AIS-arangxojn, kaj krome Prof Leonov ricevis gravan funkcion okupigxi pri scienco kaj kulturo rilate de urbo- Karlovo. Kaj flanke de BEA al la tuta Bulgario de Ortodoksa Ligo al la tuta Mondo.

Kun amikaj salutoj Alicja Lewanderska- Quednau

## <u>NIAJ INTERRILATOJ AMIKAJ</u>

**Vizito de samideano David Kelso**

( de aprilo 8 al aprilo 13, 2004)
Malnova amiko de albanaj esperantistoj, s-ro David Kelso, skoto, vizitis nin aprile 2004. Li veturis s'ipe de Bari al Durres kaj inverse. Tiu estas lia dua vizito al nia lando (la unua en la jaro 1998). La unuan tagon li estis akceptita de mi. Morgau'aon kune kun samideano Shaban Hasani ni veturis al Kruja, urbo je 32 km for de Tirana kie ni vizitis la kastelon, la etnografian muzeon, la mezepokan bazaron . La venontan tagon  s-ro David renkontig'is kun s-ro vasil Pistoli, direktoro de la Albana Esperanto- Instituto kun kiu ikazis interesa konvesacio. Surstrate li renkontig'is kun juna j esperantistoj Gentian Ymeri kaj Ariel Myrazi. Antau'lastan tagon li vizitis junulinon Rita Permeti, en s'ia hejmo kiu kus'as malsana ekde pluraj jaroj. Gstig'ante c'e mia hejmo li renkontig'is kaj babilis amikece ankau' kun esperantistino Mimoza Bunjaku (Blomberg), kiu aktuale log'as kaj laboras en Svedio. Lastan tagon li lektoris en du albanaj mezlernejoj pri la turismecaj aspektoj de Skotlando kaj Kalabrio (c'i lasta estas lando kie David aktuale instruas la anglan).
**Rita Permeti**

## Intervjuo kun David Kelso

1 Kio vekis c'e vi intereson pri Albanio?

Dum multetaj jaroj mi interesig'is pri Albanio.  Kial?  Nu, antau' la jaroj 90-aj, g'i estis sendube la lando malplej konata en Eu'ropo, do por mi misterplena!  Ec' post 1990, g'i estis/estas iom aparta:  la popolo kaj la lingvo estas unikaj en Eu'ropo, plej eble, kun la litova kaj la vaska, unu el la plej antikvaj en la kontinento.  Ankau', de mia legado pri Albanio, s'ajnis ke la vivstilo  -  precipe en la kamparo  -  estis ankorau' sufic'e *au'tentika*, per kio mi intencas ke homoj vivas ankorau' sufic'e proksime al la naturo kaj al sia historio.  Mi konstatis ke estas malric'a lando;  tamen, mi jam de longe konvinkig'is ke riceco estas relativa eco:  ric'ulo en Pes'kopio estus malric'ulo en Parizo, kaj inverse.

Pri la esperanto-movado en Albanio mi ege miris:  kiel ajn oni lernis, instruis, uzis kaj privarbis Esperanton sen oficiala aprobo, sen internacia vojag'ado, sen rimedoj?  Albanaj esperantistoj, mi konkludis, devas esti aparte lertaj homoj !

Kion vi jam visitis enlande?

2 Dum mia lastatempa 5-taga vizito al Albanio dum la paska festsezono, mi vidis nur malgrandan parton de la lando (je antau'a unutaga vizito, de Korfuo,  mi ankau' ekkonis Sarandon).  Ni alvenis Dureson (de Bari, en Italio) sed ne restis por rigardi, c'ar miaj kunvojag'antoj volis atingi Tiranon kaj kiel eble plej rapide ekiri al la marbordo (c'e Dhermi), dum mi restis en Tirano.  La morgau'on, dank' al la donemo de Shaban Hasani, mi vizitis Krujon, kiu ege imponis:  la arkitekturo, la kastelo, la bektas'a *tekejo*, la bazaro kaj la muzeo (kiu tre sukcese, mi opinias, agordas kun la antikva c'irkau'ejo).  Mi precipe g'uis la etnografan muzeon kie oni povas vidi la tradician vivstilon de albana familio, kun bonega c'ic'eronado far la klerega gardisto.  Cetere, mi esploris Tiranon piede kun Bardhyl Selimi:  bulvardojn, placojn, la *Blokon*, merkatojn, katedralojn, moskeon, la *piramidon*, k.c.

Kiaj estas viaj bonaj kaj malbonaj impresoj pri la lando?

3 Bonaj impresoj?  -  la laboremo kaj entrepreno!  Nekredeblaj.  Ec' dimanc'on duono el la butikoj funkcias kaj c'ie trovig'as apudstrate kamparanoj kiuj vendas legomojn, frukton, fromag'on ........... kaj urbanoj vendantaj ......... nu, c'ion ajn, s'ajne, de pordoj kaj fenestroj g'is s'upolurado kaj mempezado !  Kaj tiom da novaj, belaspektaj butikoj, kafejoj, oficejoj.  Tirano ja movig'adas !  La homoj s'ajnis senescepte g'entilaj, afablaj, helpemaj (c'u ankau' c'ehejme, kiu scias ?!).

Malbonaj? Nu, la c'iea rubaj'o. Mi g'ojis vidi kiel oni komencis beligi la riverbordon en la urbocentro kaj esperas ke, pograde, oni tiel plibonigos la tutan urbon, c'ar la vizitanto tuj rimarkas rubon, kvankam la tieulo ofte preterrigardas pro kutimig'o. Kaj la s'oseojn! Necesas mono por fari, ripari kaj plibonigi la stratojn, mi scias, sed mi esperas ke oni lau'eble g'ustigos la s'oseojn tiel ke la plibonigoj dau'ros. Tiuj estis miaj solaj impresac'oj.
C'u vi povas rimarki iajn paralelojn inter ambau' landoj?
4 Ho, mi rimarkis tiom da paraleloj inter Albanio kaj Skotlando, Albanio kaj Kalabrio (kie mi aktuale log'as kaj laboras). Kaj Albanio kaj Skotlando estas malgrandaj, belaj landoj kun potencaj najbaroj kaj historio de malric'o kio neprigis laboremon, entreprenemon kaj, foje, batalemon. (Antikva nomo de Skotlando, fakte, estas *Albanio*, el la gaellingva *Alba*). Ni skotoj ege fieras, kiel vi, pri nia nacia idento - eble ec' tro! Nia kamparo estas plejparte montara: bela sed malric'a kaj malfacile travojag'ebla. Nia nacia heroo William Wallace (*U'iljem U'oles*), c'efrolulo en la filmo *Braveheart*, tre similis al via Gjergi Kastrioti Skanderbeg.

Ankau' kun Kalabrio vidig'as multaj paraleloj: la montoj, la vilag'oj, la abunda marbordo, la bonega mang'o (kiun Skotlando ne rivalas), historio de subpremado, tradicia agrikulturo ....... ec' la lingvo, c'ar unu el la lingvoj de Kalabrio estas la albana (*arbares'a*), tien portita de albanaj rifug'intoj post la morto de Skanderbeg kaj ankorau' parolata en deko da montaraj vilag'oj. Kvankam la suditaloj, g'enerale, estas iom bruemaj kaj histrionaj, en la montoj, mi rimarkis, la homoj estas pli kvietaj, ankau' laboremaj kaj g'entilaj, kiaj la albanoj.
Kia opinio ekzistas pri albanoj kaj Albanio eksterlande?
5 Bona demando, kvankam malfacila. Nu, unue, mi konsilus ke oni legu iom pri la historio de Albanio c'ar hodiau'a Albanio rekte kaj klarege spegulas sian historian travivon. Due, ne kredu c'ion kion oni legas en la j'urnalac'oj pri albanoj en Italio kaj aliloke. Malfelic'e, malmultaj albanoj, pro ekstrema malhavo kaj troa avido, enig'is en la pli maldecaj partoj de la okcidenta ekonomio - sukcesege, parenteze ! - sed ili estas malgrandega escepto. Trie, pripensu la sorton de popolo kies lingvo preskau' neniu komprenas ekster la propra lando: ili nepre devas lerni kaj uzi ne nur unu sed plurajn fremdajn lingvojn, c'u la turkan, la serban, la grekan, la italan, la rusan, la anglan, la germanan. Kiom maljuste, kompare kun ni anglalingvanoj. Kiom pli juste se ni c'iuj scipovus la gepatran lingvon, kaj duan, tutmondan, neu'tralan helplingvon!

**Intervjuis Bardhyl Selimi**, aprilon, 2004

## Albanio, Skotlando, Kalabrio: komparoj kaj kontrastoj

### (Lekcio prelegata de David Kelso antau' studentoj de Nacia Hotelumada kaj Turisma Mezlernejo en Tirana, aprile 2004)

Kiel vizitanto al Albanio, mi konscias tiom da paraleloj inter tiu lando kaj mia hejmlando, Skotlando. Ankau', koincide, inter Albanio kaj la landparto kie mi aktuale log'as kaj laboras, Kalabrio en Italio.
Dum jarcentoj (ec' miloj?) Albanio strebadis realigi sian nacian identon. Same Skotlando. Skotlando estas malgranda lando (5m. da enlog'antoj) apud Anglio (50m.) kun kiu (kaj Kimrio) ni dividas la insulon Brition. Jam dum tri cent jaroj ni estas unu s'tato - la *Unuig'inta Regno de Britio kaj Nordirlando* - sed Skotlando restas aparta lando, popolo kaj kulturo. Lastatempe, ni denove havas nian propran parlamenton, por enlandaj aferoj

kiaj sanservoj, edukado, transporto k.s. Interese, kvankam la romianoj invadis Brition kaj okupis Anglion dum preskau' 500 jaroj, ili ne sukcesis konkeri Skotlandon (au' eble decidis ke ne valoris la penon!?) De tiu epoko g'is la Unuig'o kun Anglio (1707), t.e. dum pli ol mil jaroj, Skotlando estis sendependa lando, preskau' konstante batalanta kontrau' sia pli granda, pli potenca, pli ric'a najbaro, Anglio. C'u vi albanoj rekonas tian historion?

Grandega heroo de tiuj militoj estis William Wallace (*U'eljam U'olas*), la c'efrolulo en la mondfama filmo *Braveheart* (*Kurag'koro*). Denove, mi vidas paralelojn kun Gjergj Kastrioti Skanderbeg, ec' iom da fizika simileco. Ambau' estis elstare fortikaj kaj kurag'aj; ambau' estis veraj patriotoj kaj dedic'is siajn vivojn al la patrujo, ne por gloro, nek ric'o nek potenco, sed tutsimple por libero, por ke ni vivu lau' niaj propraj kutimoj, uzu niajn proprajn lingvojn, sekvu c'iu la propran religion ktp. Ambau', s'ajne, siavive fine malsukcesis; ambau' tamen lasis memoregon kiu ebligis plipostan realigon de tiu revo.

Malgrandaj landoj devas klopodegi por pretervivi. Tial famaj albanoj kaj skotoj trovig'as multloke ekster sia propra lando, precipe en najbaraj, imperiaj landoj. Skotoj inventis la vapormotoron (Watt), la biciklon, la modernan s'oseon (*tarmacadam* el *MacAdam*, la inventinto), la pluvmantelon (*Macintosh* au' simple *mac*), la pneumatikon (Dunlop) kaj la pos'tmarkon. Skoto fondis ec' la nacian bankon de Anglio (nun de Britio), la *Bank of England*, kaj oni povus diri ke la moderna petrolindustrio komencig'is en Skotlando per minado kaj uzo de parafino en la deknau'a jarcento. Dum la dau'ro de la Brita Imperio, skotoj trovig'is c'ie kiel ing'enieroj, kontistoj, bankistoj, soldatoj, kuracistoj, misiistoj (ekz. David Livingstone en Afriko) kaj administrantoj - tutsimple c'ar mankis c'ehejme ekonomiaj oportunoj. Same la albanoj kaj antau' ili la ilirianoj, c'u ne, en la imperioj greka, romia, bizanca, otomana ktp ..... ? Kaj en Skotlando kaj en Albanio la edukado estis c'iam plej grava: la usona sistemo de supera edukado modelig'as plejparte de la skotlanda.

Strange, la antikva nomo de Skotlando estas *Albanio* (anglalingve, *Albany*), el la gaelalingva *An Alba*. Historie, Skotlando havis kvar lingvojn: la piktan (neniam skribita, uzita c'efe en orienta Skotlando g'is la 11-a jarcento); la gaelan (de Irlando, ankorau' parolata, c'efe en okcidenta Skotlando); la skotan (tre simila al la angla sed g'is la 17-a jarcento, aparta lingvo uzata oficiale c'ie en meza Skotlando; nun nur dialekto de la angla); kaj la anglan, g'ermandevena lingvo, parolita en sudorienta Skotlando samlonge kiel en Anglio. Hodiau', la unua lingvo de c'iu estas la angla, kvankam la gaela kaj la skota ankorau' audig'as.

Paraleloj kun Kalabrio estas pli fizikaj ol kulturaj. Kalabrio, kiel Albanio, estas bela, montara, mediteranea lando, kie trovig'as bilanco inter suno kaj pluvo (en Skotlando tute mankas tia bilanco!). Ankau' Kalabrio spertis invadojn: de antikvaj grekoj (Kalabrio tiutempe nomig'is *Granda Grekio - Magna Graecia*), de romianoj, bizancanoj, kaj turkoj, sed ankau' de vizigotoj, saracenoj, normanianoj, aragonanoj, germanoj kaj francoj. Ec' la britoj mallonge invadis dum la napoleona milito. Malkiel Albanio, Kalabrio neniam estis sendependa: dum 3000 jaroj c'iuj regis Kalabrion krom la kalabrianoj mem. Ankau' lau' ekonomio Kalabrio tre similas al Albanio: abundas la naturaj rimedoj, c'u mineralaj, c'u vegetalaj, sed g'is lastatempe mankis industrio. Dum Albanio strebas g'ustigi la mankon, en Kalabrio malmulto okazas: krom turismo, agrikulturo kaj forstado, preskau' tute mankas ekonomia aktivo. La registaro en Romo investis miliardojn da eu'roj en suda Italio (la *Kaso*

*per la Sudo*), kio uzig'is plejparte por au'tovojoj, havenoj, pontoj, akvoservoj kaj similaj, sed ankorau' mankas vera industrio.
Kaj la kalabrianoj? - c'u ili similas la albanojn? Nu, iuj estas albanoj! Antau' preskau' 500 jaroj, post la morto de Skanderbeg, iuj miloj da albanoj rifug'is al Italio kaj eklog'is en Puljio (*Puglia*), Sicilio kaj Kalabrio. Post tiom da jaroj la lingvo (*Arbares'*) ankorau' vivas kaj uzatas c'iutage en iuj montaraj vilag'oj. Tamen, pli similas la lingvon de Gjergj Kastrioti ol la albanan lingvon de hodiau'! [Parenteze - ankau' pluvivas en Kalabrio dialekto greka - *grekaniko* - kiu uzatas jam pli ol 2000 jaroj]. Surface la kalabrianoj malsimilas la albanojn - pli eferveskaj, pli ekagemaj - sed mi rimarkis ke en la montaraj regionoj (kie la homaro estas vere *kalabria*, sen tiom da mikso kun aliaj italaj gentoj) la konduto pli similas al la albana: serioza, laborema, honesta, konstanta.
C'u ni povas lerni ion el tio? Nu, la homoj c'ie samas kaj malsamas !! Vere, sed per interkomparo de Albanio, Skotlando kaj Kalabrio, s'ajnas al mi ke oni povas vidi ke gravas ne nur la homtipo, la genoj, sed ankau' la historio. Albanio, samkiel Skotlando kaj Kalabrio hodiau'aj, estas rezultato de pasintaj epokoj, de historia travivo. La pasinto restas c'iam aktuala, c'u ne?
**David Kelso**
(Ellaborita en majo 2004)

## PROPAGANDO

### KOMPRENI LA DIFERENCON INTER FINVENKISMO KAJ RAUMISMO: KOMENTARIOJ

Afabla letero de s-ro Mato Spekuljak:
"Mi devas konfesi ke al mi persone raumisma starpunkto, almenau kiel ghi estas sube prezentita, shajnas pli logika kaj perspektiva, sed mi samtempe preferus ke kaj finvekismemaj kaj raumismemaj esperantistoj laueble pli -- se ne amike almenau kolege -- kunlaboru surkampe de laueble pli sukcesa popularigado kaj disvastigado de esperanto kiel ghis nun la plej sukcesa - profundhumanisma - projekto de la monda planlingvo. Min persone ne ghenas se kaj kiam du konceptoj pri "esenco kaj estonteco de esperanto" - la finvenkisma kaj la raumisma - konkurencas unu kun la alia, konkurencado devus esti bonvena ankau en Esperantujo - kial ne?, sed tiu konkurencado estu laueble pli konstruema anstatau malkonstruema, laueble pli pozitiva anstatau negativa". La problemo kiun rimarkigas s-ro Spekuljak ekzistas, sed ghi ne fontas el la raumismo. Pro sia naturo mem, la raumismo konsideras ke chiuj esperantistoj estas respektinda ero de la Esperanta popolo, ech se ili ne konscias pri tio au ne volas tion. Analogio 1: marksismo au anarkiismo konsideras ke chiu laboristo apartenas al la proletaro, ech se li ne havas (ankorau) klaskonscion. Analogio 2: cionismo konsideris ke chiuj judoj apartenas al emancipota popolo, ech se multaj judoj rifuzis tion. Analogio ne estas egaleco de kazoj, evidente, sed utila komprenigilo. Do, por raumisto ankau finvenkisto estas esperantisto kaj potenciala Esperantiano. Aliflanke la diversaj finvenkismoj konsideras ke raumismo estas kvazau herezo, kaj ili ne kapablas ghis nun integri ghin en la "finvenkisma eklezio". Pruvo estas, ekzemple, ke UEA atendis dek unu jarojn antau ol publikigi en sia organo la Manifeston de Raumo (cetere en malperfekta teksto). La finvenkismo postulas internan disciplinon kaj vertikalismon, pro sia naturo mem: ja nur disciplinita armeo atingus la venkon. Do por finvenkisto, principe, raumisto estas malbona esperantisto: fakte la raumistoj estas kalumniataj kiel egoistoj, personoj kiuj

neglektas la socion, homoj kiuj ne volas varbi por esperanto ktp. La Esperanta Civito per sia ekzisto mem pruvas, kiom granda estas la mensogo de tiuj finvenkistoj. Kiuj, anstatau penti kaj memkritiki sin, ne eltenas aspekti malpravaj kaj plu kalumnias, tiel akcelante la ruinighon de siaj finvenkismaj organizoj.

**Reago**

**KOMPRENI LA DIFERENCON INTER FINVENKISMO KAJ RAUMISMO**

Shajnas ke sinjoroj Blanke, Ertl kaj Galor, jam konataj pro diversaj misprezentoj pri la Esperanta Civito, lanchis dokumenton trompe pacigan. Sed pri ilia operaco okupighis jam la Civitaj gvidantoj, interalie la Konsulo, prof. Walter Zelazny, en sia novjara salutmesagho. Espereble LOdE diskonigos ankau ilian vidpunkton, kaj ne nur la kritikojn de la anticivistoj. Persone kaj sen polemiko mi shatus altiri la atenton de la publiko al la (daure aktuala) diferenco inter finvenkismo kaj raumismo, por ke oni komprenu pri kio temas. Finvenkismo estas la kredo, ke en la internaciaj rilatoj ekzistas speco de tendenco, kvazaua legho, kiu kondukas de multlingvismo al unulingvismo. Tiu tendenco, kiel sagace rimarkis Tazio Carlevaro, venas parte de postuloj de praktikeco, parte de kulturo, parte de justeco. La finvenkistoj nature vetas por esperanto: ili opinias ke vastan kaj oficialan akcepton de nacia lingvo en internacia rolo malhelpas kaj la sentoj de lingva justeco kaj demokratio, kiuj enestus en chiu homo, kaj naciismaj identec-sentoj. Carlevaro opinias la finvenkismon erara, char la homoj pli kaj pli indiferentas al tiuj valoroj (justeco, demokratio ktp). Klarigo tamen tro simpla: la problemo estas pli vasta. Kaj tie chi aperas raumismo. Kiel oni povas percepti Historion? "Sub specie religiosa", oni kredas ke iam Dio envenas la mondon (ekz. tra Kristo): antau tiu momento Historio estas perceptebla esence kiel preparo, poste esence kiel plenumo. Sed ankau laikoj supozas, ke Historio ne estas kolekto de pli-malpli hazardaj eventoj: homo povus kompreni ghian sencon, ghiajn "kursojn kaj rekursojn", ech antauvidi eventojn. Tion kredis Vico, Kant, Hegel ktp, inkluzive de la respektivaj dischiploj, inkluzive de hegelido Karl Marx. Surbaze de tia percepto, finvenkisto opinias ke la homaro evoluas atende al iu novajho nomata Lingvo Internacia; tiu chi ekzistas ekde 1887 -- la bezono ne farighis ankorau tiel granda ke la novajho venku, sed iam farighos. Raumismo ne interpretas tiel. Raumisto opinias ke Lingvo Internacia ne respondas al bezono de la homaro, sed al bezono de (la) homoj. Ne temas pri tautologio. Simple esperant(ism)o per si mem ne povas shanghi la destinon de la homaro, sed povas shanghi la destinon de (la) homoj. Ghi ne intervenas/os modife en la historion (espero de la finvenkistoj) sed rolas che la individuoj (konstato de la raumistoj). La kunigo de tiuj individuaj destinoj formas komunan destinon: jen la Kvintezo, jen la kerno de la Pakto por la Esperanta Civito. Lau raumismo, tiu komuna destino, fontanta el la konscio aparteni libervole al diaspora lingva minoritato, formas la esperantan identecon; kaj tia esperantisteco validas kaj valoras sendepende de la "fina venko". Tial indus lerni, disvolvi kaj disvastigi esperanton, ech se chiuj internaciaj organizoj uzus nur unu nacian laborlingvon, ech se la "monda lingvoproblemo" estus definitive solvita tute alimaniere ol auguras la finvenkistoj. Esperant(i)o estas per si mem valoro en la mondo, sendepende de la (reduktiva) funkcio de nura helpa komunikilo. Jen la revolucia mesago lanchita en Raumo 1980, kaj kohere disvolvita en Varsovio 1984, Segedo 1988, Chaudefono 1998 kaj Sabloneto

2001. Ghis la revido en augusto 2004 che la simpozio pri "Esenco kaj estonteco de Esperantio", kadre de la Kultura Esperanto-Semajno organizata de KCE, Svislando, al kiu estas bonvenaj esperantistoj de chiuj tendencoj. **(Giorgio Silfer)**

**CHU LA EUROPA DEKSTRO MOBILIZITA KONTRAU ESPERANTO?**

De Bruselo al Parizo, la europa dekstro shajnas mobilizita kontrau nia lingvo. Tion oni deduktas el du jhusaj eventoj, pri kiuj cetere cirkulis kontraudiraj informoj. En la dua evento, estis miskompreno pri la nomo de ministro. En la unua, miskompreno pri la rezulto de vochdono. Che la Komisiono pri konstituciaj aferoj de la EU-Parlamento, 17 mar 04, la raporto pri la perspektivoj de multlingvismo inkluzivis Eon, danke al la radikala deputito Gianfranco Dell' Alba. Sed amendo de la germana kristandemokrato Ingo Friedrich (parlamenta vicprezidanto) forigis tiun favoran mencion, per 14 vochoj kontrau 12. Aliflanke la franca ministro pri kulturo, Jean-Jacques Aillagon, en radiointervjuo che France-Inter 15 marto 2004, sin esprimis kontrau Eo, fakte per la samaj argumentoj uzotaj de Ingo Friedrich du tagojn poste: lau ili nia lingvo estus senkultura. Tial ke interpretistoj kaj tradukistoj el malpli konataj lingvoj al same malpli konataj (ekz. greka al dana) ofte apogas sin al la angla au franca, nome atendas la tradukon al pli grava lingvo, la raporto Dall'Alba celis, ke tiun pivotan rolon povu plenumi Eo. Ne temas pri la tipe finvenkisma strategio, lau kiu Eo estu la dua lingvo por chiuj, sed pri la sugesto, ke Eo estu ia helplingvo che interpretistoj kaj tradukistoj. Tamen la diskuto estis sharghita de politika signifo, char duono de la komisionanoj kontraustaris la amendon, uzante ne teknikajn argumentojn, sed politikajn. Probable se, anstatau diri Eo ne havas kulturon, oni rimarkus ke tiu rolo ne eblas por idiomo en kiu mankas la oficialaj EU-terminaroj, la malamikoj de Eo estus apenau kontrasteblaj. Pro tiu taktika eraro de la malamikoj, la diskuto enfokusighis pri "Havas au ne kulturon". Kaj la fina rezulto havas pli gravan signifon politikan: nome, EU-instanco unuafoje devis sin esprimi formale pri Eo, kaj la instanco praktike duonighis inter poraj kaj kontrauaj. Entute cheestis 26 deputitoj, kaj la negativa amendo pasis pro unu vocho. Estas interese, ke la malamika fronto estis gvidata de germana kristandemokrato, Ingo Friedrich. Tiu chi sinjoro en junio 2003 sendis saluton kiel vicprezidanto de la EU-Parlamento al la 80a Germana E-Kongreso. En tiu saluto li bedauris sian necheeston kaj, menciante ke kultura diverseco estas antaukondicho por paco, li aldonis: Eo estas vojmontrilo sur nia longa vojo al interkomprenigho kaj integrigho en malgrandighinta mondo. Ingo Friedrich montris sin inklina al la argumentoj pri defendo kontrau lingva diskriminacio en dunganoncoj. Tamen post la jhusa sperto, ni rimarkas ke tiu taktiko povas krei falsajn amikojn: ne estas perceptebla (char efektive ankorau tro distanca) la rilato inter batalo kontrau lingve diskriminaciaj dunganoncoj, unuflanke, kaj enkonduko de Eo en EU-praktikon, aliflanke.

**Kurso en Israelio**

Karaj geamikoj el Israelo kaj de aliaj lokoj,

Mi denove informas vin pri la tre bona kurso pri Komputiloj verkita kaj gvidata de nia samideano el Omer, D-ro Gian-Piero Savio.

La kurso aperas en la Interreto sub la retejo de ELI. G^i estas konvena por "simplaj" homoj, kiuj ne konas la temon de komputiloj.
G^is nun lernas en g^i nur unu Israelano, fakte Israelanino. S^i estas nova esperantistino kaj lernas diligente. Gian-Piero deziras havi pliajn lernantojn el nia lando kaj el aliaj partoj de Esperantujo.
Vi estas invitataj viziti g^in kaj poste ankau` alig^i!
Jen: http://www.esperanto.org.il/komputiko-kurso

**Sciigo de Redaktoro de "G'emelaj Urboj"**
**From:** Wu Guojiang [amikeco999@21cn.com]
**Sent:** Friday, March 19, 2004 1:46 PM
Estimataj, Kiam vi ricevas chi numeron de Informilo de Ghemelaj Urboj, mi, chi tie, estas en charma printempo. Mi sendas mian printempan saluton al vi. Se vi havas proponon, diru tion al mi. Se vi havas artikolon, sendu tion al mi. Se vi ne volas plu ricevi chi-revueton, informu min.
Amike
Wu Guojiang komisiito de UEA pri la projekto"Ghemelaj Urboj"

**Kio estas Skype?**
La softvaro Skype (prononcu "Skajp") ebligas uzi vian PC-on kiel telefononon, kondiche ke ghi havu mikrofonon. La softvaro trovighas che: <http://www.skype.com> . Ghi estas plurlingva. La E-versio estas finota, sed jam uzebla, kaj ni klopodos ke ghi estu oficiale inkluzivita en la softvaro. Ekzistas helppagho en Esperanto (far Emilio Cid el Brazilio): <http://www.esperantointernacia.hpg.ig.com.br/skype.htm> Kaj la skajp-uzantoj havas sian retliston: <http://groups.yahoo..com/groups/skajpanoj>. Regule uzas ghin jam pluraj dekoj da esperantistoj (aprilo 2004: 90 el 30 landoj) interalie homoj de la fama E-portalo Gxangalo, la Brusela komunikadcentro, El Popola Chinio, Unuigho Franca por Esperanto, Esperanto Nebraska, la E-parolanta tradukkompanio LinguaForce, ktp., kaj certe baldaû ankaû UEA... :-) Emilio Cid uzis la softvaron Skype okaze de radio-elsendo por la E-radio Agentejo Mondo, dum kiu li intervjuis samideanon Flavio Rebello, okaze de lia turneo en Eûropo por la projekto ITV. Tiam, Emilio estis en Brazilio kaj samtempe Flavio estis en Francio! Aûskultu che: <http://radioarkivo.org/plenlisto.php/12> (9a de marto). Oni povas diri ke Skajp' funkcias mirinde bone. Estas ne tro da malfruo en la parolo, kaj ghenerale la vocho sonas ech pli bonkvalita ol normala telefono, tiel ke oni povas havi strangan impreson de proksimeco, ech parolante kun iu sur alia kontinento. La softvaro estas senpaga, tute laûlegha, funkcias ech per modemoj (56K), tute ne ghenatas de la kontraûfajrigiloj, kaj ties konstruanto fieras ke ghi entenas nek reklamon nek spjonvaron. Per Skajp', eblas ech paroli plurope kune (ghis kvin homoj)! Sola problemeto estas ke momente, ghi funkcias nur per Vindozo (minimume 98), sed ili promesas ontajn versiojn por Macintosho kaj Linukso (tamen kelkaj jam sukcesis ghin funkciigi sub Linukso per la vindoz-emulatoro Wine). Tre baldaû, ankaû eblos uzi ghin por atingi klasikajn telefonojn (kontraûpage chifoje, sed vershajne relative malmultekoste). Memoru kia enorma progreso estis la apero de la Interreto por la Esperanto-movado: antaû la Interreto, plejparto el ni povis konkrete praktiki Esperanton nur dum ferioj, do nur dum kelkaj semajnoj jare. Kaj de kelkaj jaroj, dank'al la Interreto, ni povas komuniki chiutage en Esperanto. Ghis nun, temis nur pri skriba komunikado, char

internacia telefono tro multekostis, kaj ne vere estis agrablaj interretaj paroliloj. La interreton alportis tamen tiun grandan progreson de chiutaga komunikebleco. Sed nun alvenas nova epoko, ekde kiam denove dank'al la Interreto, ni finfine povos uzi nian lingvon chiutage, ankaû parole! Imagu ke jam regule, ekzistas eûropanoj, kiuj babilas en Esperanto kun azianoj dum horo(j), sen ech pensi pri mono. Kompreneble, bezonatas mikrofono, kio ghenerale facile troveblas en komputilaj butikoj. Ankaû, plejparto de ttt-kameraoj nun havas internan mikrofonon. Se vi ankoraû ne konas amikojn de vi, kiuj ghin uzas, vi tute rajtas provi alvokante min, ekzemple al mia profesia adreso "linguaforce" inter la 10a kaj la 20a GMT+2. Aliteme, se vi kuraghis legi ghis chi tie: char profesie mi laboras en kampo de tradukado, mi havis ideon uzi tiun novan ilon, kiu bone funkcias, kun alian pli malnovan ilon, sed kiu ankoraû sufiche bone funkcias: Esperanton. Mia celo estas provi starigi servon de telefona interpretado (vocha tradukado) inter pluraj landoj. Tian servon uzas homoj en entreprenoj, kiam ili volas komuniki ekzemple kun kliento eksterlande. Intepretisto tradukas siajn parolojn al la alia homo kaj inversen. Tion teorie eblas fari kun Esperanto kiel pontolingvo, des pli ke jam ekzistas kelkaj tradukkompanioj, kiuj jam faras tion per la angla lingvo, kvankam ghi estas esence multe pli fusha kaj malklara ol Esperanto.
Se interesas vin, aû si vi konas esperantiston kiun tio povas interesi, skajpu min por havi pliajn klarigojn. Ni serchas interesatojn en chiuj landoj de la mondo (kaj chefe en Eûropa Unio, Nordameriko kaj Azio, kie estas nune la plej eventualaj konkretaj bezonoj) por fari provojn.
**Philippe Bérizzi**

**Nova ebleco por pli ofte paroli Esperanton**

De "Philippe Bérizzi" <pberizzi@linguaforce.com>

Skype: revolucia ilo por la E-movado. Eble, vi scias ke pluraj esperantistoj jam uzas novan ilon por komuniki kun amikoj tra la mondo, voche, efike kaj tute senpage! La softvaro Skype [Skajp'] ebligas uzi vian PC-on kiel telefononon, kondiche ke ghi havu mikrofonon. La softvaro trovighas che: <http://www.skype.com
Ghi estas plurlingva. La E-versio estas nune farata kaj normale ghi estos oficiale inkluzivita en la softvaro. Ekzistas helppagho en Esperanto far samideano E. Cid el Brazilio: <http://www.esperantointernacia.hpg.ig.com.br/skype.htm Kaj la skajp-uzantoj havas sian retliston: <http://groups.yahoo.com/groups/skajpanoj. Oni povas diri ke ghi funkcias mirinde bone. Estas ne tro da malfruo en la parolo, kaj la vocho sonas ech pli bonkvalita kelkfoje ol normala telefono, tiel ke oni povas havi strangan impreson de proksimeco, ech parolante kun iu sur alia kontinento. La softvaro estas senpaga, tute laulegha, funkcias ech per modemoj (56K), tute ne ghenatas de la kontraufajrigiloj, kaj entenas nek reklamon nek spjonvaron. Sola malavantagho estas ke momente, ghi funkcias nur per Vindozo (minimume 98), sed ili promesas ontan version por Macintosxo kaj Linukso. Ekde nun, UEA kaj TEJO teorie povus komuniki vocxe kun pluraj landaj asocioj, tiel shparante la monon de la asocio!!! Same pri chiuj UEA-fakoj
kaj E-organizoj, kiuj havas aktivulojn en diversaj punktoj de la mondo. Memoru kia enorma progreso estis la Interreto por la Esperanto-movado: antau la Interreto, plejparto el ni povis konkrete praktiki Esperanton nur dum ferioj, do nur dum kelkaj semajnoj jare. Kaj de kelkaj jaroj, dank'al la Interreto, ni povas komuniki chiutage en Esperanto. Ghis nun, temis nur pri skriba komunikado, char internacia telefono tro multekostis, kaj ne vere estis agrablaj interretaj paroliloj. La interreton alportis tamen tiun grandan progreson de chiutaga komunikebleco. Sed nun alvenas nova epoko, ekde kiam denove dank'al la Interreto, ni finfine povos uzi nian

lingvon chiutage, ankau parole! Skajp' funkcias, kaj facile proveblas. Kompreneble, bezonatas mikrofono, kio ghenerale facile troveblas en komputilaj butikoj. Ankau, plejparto de ttt-kameraoj nun havas internan mikrofonon. Se vi ankorau ne konas amikojn de vi, kiuj ghin uzas, vi tute rajtas provi alvokante min, ekzemple al mia profesia adreso "linguaforce" inter 9H kaj 19H GMT.

Aliteme, char profesie mi laboras en kampo de tradukado, mi havis ideon uzi tiun novan ilon, kiu bone funkcias, kun alia pli malnova ilo, sed kiu ankorau mirinde bone funkcias: Esperanton. Mia celo estas provi starigi servon de telefona interpretado (vocha tradukado) inter pluraj landoj. Tian servon uzas homoj en entreprenoj, kiam ili volas komuniki ekzemple kun kliento eksterlande. Intepretisto tradukas siajn parolojn al la alia homo kaj inversen. Tion teorie eblas fari kun Esperanto kiel pontolingvo, des pli ke jam ekzistas kelkaj tradukkompanioj, kiuj jam faras tion per la angla lingvo, kvankam ghi estas esence multe pli fusha kaj malklara ol Esperanto. :-) Se interesas vin, au si vi konas esperantiston kiun tio povas interesi, skajpu min por havi pliajn klarigojn. Ni serchas interesatojn en chiuj landoj de la mondo (kaj chefe en Europa Unio, Nordameriko kaj Azio, kie estas nune la plej eventualaj konkretaj bezonoj) por fari provojn.

**Philippe Bérizzi**
(skajpu min che konton "linguaforce") http://www.linguaforce.com/eo/

**EN EUROSCOLA 90 JUNAJ ESPERANTISTOJ**

Carola Antskog el Finnlando estis motoro de esperantista seminario por eu'ropaj lernejoj. Krom s'ia grupo partoprenis grupoj el Anglio, Pollando, Slovenio kaj gastoj el Rusio, Ukrajnio kaj **Albanio**. En la seminario en Strasburgo dum tri tagoj okazis multaj interesaj programoj kaj en la kvara tago c'iuj partoprenis en la Eu'ropa Parlamentejo Euroscola-n la 28-an de aprilo. Pro intensa programo la gejunuloj multe amikis kaj interligig'is. La finna, angla kaj pola lernejoj estis oficiale invititaj al Euroscola kaj sendis c'efe esperanto-lernantojn. Bona sperto kau'zas sekvajaran ripeton.

Raportis: Zlatko Tisxljar <zlatko.tisljar@siol.net>

**VALORA INTERESA UZADO DE ESPERANTO POR SCIENCA INFORMIGHO EN INTERRETO AL MEMLERNANTOJ!**

Kadre de la Komputika Esperanta ROndo (KERO) de la ILEI-revuo Juna Amiko, oni oficiale lanchis aktualan unuan senpagan Interretan kurson en Esperanto pri KOMPUTIKO kaj PROGRAMADO (per programlingvo Java).

Jen ghiaj karakterizoj:

a. La kurso ne postulas iun ajn antauan teorian scion pri komputiloj.
b. La programlingvo Java estas fakte ege grava por TTT-ejaj uzoj en Interreto.
c. La kursa materialo estas en nivelo de supera lernejo, tamen la instru-metodo celas komprenigi la temojn kaj praktikigi la sciojn al chiu "seriosa kaj laborema" chiuagha komencanto.
ch. La kurso estis projektita lau la metodo "programita lernado", kiu, postulante dauran retroagon fare de la lernanto, rezultigas aktivan lernadon, pli rapidan kaj firman komprenadon kaj enmemorigadon.

Jen la adreso de la kurso: http://www.esperanto.org.il/komputiko-kurso

PROVU (kial ne?), GXUU vian tempon kaj SUKCESON! KERO-skipo
**Henri Masson**

**NEKROLOGIOJ**

**OSZKÁR PRINCZ 1947-2004**

Estis shokite kaj nekredeble vidi denove la jam bone konatan nomon nun nigre enkadrigitan sur la mort-anonco pri la 10an de aprilo. Jen ankau kelke da tagoj ni persone parolis kun Oszkár Princz dum la budapeshtaj Pedagogiaj Tagoj kie li raportis al ni pri la shtataj lingvaj ekzamenoj... Oszkár estis tiel elstara, tiel nelacigeble laborema, tiel entuziasma ke meritas konatigi al kiel eble plej multaj lian vivon, kiu estas ekzemplo por ni chiuj! Kun la afabla permeso de D-ro Attila Salga ni aldonu parton de la lastjare publikigita intervjuo kun Oszkár Princz en la 14a volumo de "Szabolcs-Szatmár-Bereg Megyei Almanach" (Almanako pri Departemento Szabolcs-Szatmár-Bereg). "Oszkár Princz 1947-2004 ghenerala sekretario de HEA (Hungaria Esperanto-Asocio), prezidanto de lingvoekzamena komitato. Li naskighis la 17an de majo en 1947 en la "Vas" departementa vilagho "Szentpéterfa". En 1973 li finis la fakon de popoledukisto - bibliotekisto, poste en 1977 fakon pri estetiko. Li farighis entuziasma apoganto de amatora aktorado kaj dank' al sia reghisora diplomo li gvidis teatrajn grupojn en Sabatejo kaj Kõrmend (urboj en okcidenta-Hungario), ech verkis teatrajhojn. Kiel popoledukisto estrante kulturdomojn, klubojn, junularajn asociojn, en la komitatoj de Patriota Popolfronto (funkcianta kiel kvazau-partio dum la socialismaj jaroj en Hungario - trad.) oni kalkulis je lia organiza, direktanta agado. Post la reghimshangho li studis internacian komercon, kaj en 1995 li akiris supergradan kvalifikon pri turisma managherado. Ekde 1977 dum du jaroj li laboris en Prago, che la Hungara Kultura Centro, kie li enmiksighis la chehhan esperanto-movadon. Poste, dum tri jaroj li agadis en Budapeshto, en la 19a distrikta kulturdomo, en diversaj laborteritorioj. Li de preskau tridek jaroj estis adepto kaj disvastiganto de la relative facile lernebla internacia lingvo. Ekde 1982 li direktas la enlandan esperanto-movadon kiel organiza sekretario, iom poste kiel sekretario kaj ghenerala sekretario de HEA. Li fondis kaj dum kvin jaroj ankau gvidis turisman oficejon "Espertur". En la kuratorio de la Hungara Radio li reprezentis la civilajn organizojn, kaj krom esperanto li plejparte okupighis ghis sia morto pri kontaktado kun sociaj organizajhoj. Ekde la 90aj jaroj li partoprenis la laboron kiel prezidanto en la ekzamena komitato de la Fremdlingva Perfektiga Centro (ITK). Lia unua lingvolibro aperis en 1984, kaj li eldonis entute kvin librojn por la preparigho al shtata lingvo-ekzameno. Por la pli profunda studado de lingva komunikado en 1995 li fondis organon kun titolo "Az EU és a nyelvi kérdés" (EU kaj la lingva demando). Kiel fondinto de Nyelvek Egyenjogúságáért Társaság (Societo por la Lingva Egalrajteco) li kune kun la Verkista Asocio, lingvistoj kaj stabanoj de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj organizis konferencojn, rekte kontaktis kun pluraj EU-komitatoj. "Malantau la kulisoj ni ekis jam plurajn iniciatojn por la cheso, sed almenau la malpliigo de la babela lingvokonfuzo en la EU-landoj -- li diris. -- Certe chiu lando rajtas uzi sian gepatran lingvon, tio tamen malfaciligas kaj ege multekostigas la afergvidadon en la 25-membra Europa Unio. Chiam la lingvoj de ekonomie kaj politike forte potenchavaj landoj atingas/is staton de monda lingvo plu pligrandigante la avantaghon de la koncerna/j lando/j. Por kontentige regi lingvon necesas ch. 2.000 horoj, dum esperanto estas lernebla dum 200 -- 300 horoj. La instancoj de Europa Unio uzas 21, kaj lau la postaj planoj 23 oficialajn lingvojn. La eblaj tradukaj variantoj plukreskos de la nuna 110 al 420. Por eviti tiun babelan lingvan konfuzon jam plurfoje levighis la eblo de t.n. pontolingvo. Tiukaze

-- konforme al la bazaj principoj de Europa Unio -- realighus la egalrajteco de lingvoj." La ghenerala sekretario de HEA poste mencias, ke 88 procentoj de hungaroj parolas ech ne unu fremdan lingvon. Nur la 20 procento de la alighintoj al supera kvalifikado posedas shtate rekonitan lingvan ekzamenon. Kiel la simpla civitano povos elturnighi sen lingvoscio eksterlande? Poste li eksplikas, ke antau dekkvin jaroj neniu povus pensi, ke socialismo kiel mondreghimo disfalos. Nun shajnas fantazia la enkonduko de esperanto kiel pontolingvo en EU, sed ni povis jam plurfoje sperti, ke estintaj fantazioj poste realighas. Ankau euro shajnis utopio antau jardeko kaj nun ghi estas jam bone funkcianta pagrimedo. (...) Multaj proponis lin inda ricevi honorigon de "Honora Membro de UEA" en la 2004-jara UK, kiun ghis nun ricevis en Hungario nur du, kaj en la tuta mondo entute 50 personoj posedas." ... kaj jam li estis entombigita. En printempa varmo ni -- pli ol cent -- staris triste che lia cherko... foje audeblis flustre, "chu vi memoras, kiam Oszkár diris, ke..." Jes, ni mencias lin ankau nun, kvazau li estus ankorau inter ni, char estas dolorige ke li neniam plu respondas niajn demandojn. Homo valoras plej multe se por ni ties morto estas nur korpa, fizika, kaj ties rememoro kaj laboro restas daure vivanta. Por la esperantistoj dise de la mondo kiuj lin konis, kaj precipe en Hungario, chiam li restos tiel inter ili. Nome de rememorantoj pri li,

**Judit Felszeghy**

**Noto:** Sinjoro Oszkar Printz estas konata ankau’ al albanaj esperantistoj. Li vizitis nian landon januare 1997 kunlabore kun la turisma agentejo “Atlas”. Akompanata de frau’lino Majlinda Bime li kaj alia hungara akompanantino vizitis la urbo-heroon Kruja je 32 km for de Tirana kaj kelkajn objektojn en la c’efurbo. Kune ni prisdiskutis la eblecojn de plua kunlaboro. Li engag’is sin por helpi kiel ajn niajn gejunulojn partopreni internaciajj e-arang’ojn en Hungario. Ankau’ poste li montris sin preta helpi por akirigi vizon al albanaj esperantistoj. Lau’ nia memoro Oszkar estis modesta klera kaj tre afabla konversacianto. Ankau’ ni esprimas nian profundan estimon kaj kondelencas gefamilianojn kaj samideanojn hungarajn pro tia granda perdo.

**Majlinda Bime**

MEMOROJ PRI OSZKAR PRINCZ

Kun granda malg’ojo mi eklernis danke al HeKo, frumaja numero, pri la forpaso de samiedano Oszkar Princz. Mi konatig’is kun li fine de 1996 jaro perkoresponde kaj komence de 1997 jaro ankau’ persone. Oszkar petis min inviti lin kaj lian sekretariinon viziti Albanion kaj kontakti ties vojag’agentejojn. Mi faris tion plezure. Ambau’ hungaraj geamikoj invititaj oficiale de Tirana vojag’agentejo ATLAS, membro de iama Monda Turismo organizaj’o, akomodig’is c’e hotelo California kaj poste Rogner en c’efurbo. Akompanate de s-ro Xhangolli (Dj’angoli) agentejestro, kaj esperantistino Majlinda Bime, (iam vizitinta Hungarion okaze de junulara festivalo tie), ili vizitis kelkajn turismejojn en Tirana kaj la apudan historian urbon de Kruja. Ni renkontig’is kelkfoje en la hotelo kaj promenis lau’ la granda bulvaro de Tirana. Tiutempe, en Albanio okazis eksterordinaraj eventoj, amasoj demonstraciis kontrau’ la fifamajn lukompaniojn kie ili estis perdintaj c’iujn iliajn mons’paraj’ojn kaj kontrau’ la s’taton kiu indiferentis pri tio.
Oszkar estis tre modesta kaj samtempe tre klera homo. Li emis kunlabori kun ni kaj helpi nin iel ajn. Li pretis interveni c’e la instancoj de HEA kaj UEA por trejnigi kaj partoprenigi albanajn esperantistajn gejunulojn c’e diversaj internaciaj arang’oj. Reveninte en Hungarion Oszkar dau’re interesig’is pri Albanio. Li ec’ respondis pozitive al s-ro Shaban Hasani, esperantisto, kiu petis lin sendi invitilon por viziti Hungarion.

Ni memoras pri li respekte kaj nostalgie. Plej elkorajn kondolencojn al liaj parencaro kaj amikaro en Hungario.
**Bardhyl Selimi**, sekretario de la Albana Esperanto- Instituto

**Petko Arnau'dov**
Tute hazarde ni sciig'is pri la forpaso de alia granda esperantisto, same amiko de Albanio, s'ro Petko Arnau'dov. Mi ekau'dis pri li delonge, c'ar estasnte kolego-instruisto pri matematiko, mi sciig'is pri liaj lecionoj en la internacia infanlernejo dum la Konferencoj de ILEI. Poste mi eklegis lian bonegan libron "Amuza Matematiko en la Lernejo", tre ric'a je instrukcioj por arang'i matematikajn vesperojn, je problemoj amuzaj, logikaj ktp tre allogaj por geinfanoj , je biografietoj de elstaraj matematikistoj. Danke al Petko mi membrig'is al Internacia Asocio de Matematikaj Instruistoj kaj ekricevis la ties Bultenon. S-ro Petko notinde helpis en la redaktado de tiu Bulteno, same de la verkoj de s-ro gerald Cool, matematikisto log'anta en Leibnitz de Au'strio je ric'a vivsperto kaj laborspero surkampe de matematika instruado. Pli ol kvin verkoj de Cool estas redaktitaj kaj prizorgitaj por eldono kaj vendo fare de s-ro Petko. Cetere Petko helpis ankau' min per traduko de leteroj al s-ro J'eliu J'elev kies verkon "la fas'simo " mi sukceesis enalbanigi kaj publikigi en mia lando antau' tri jaroj. Mi ec' enalbanigis ankau' bonegan libron je bulgaraj au'toroj enesperantigita de s-ro petko Arnau'dov, kiu tute malavare permesis g'in al mi. Tiu libro "La balkana Kuirejo" estas vaste vendata nun albanlingve c'e ni. La morto de Petko ege s'okigis min des pli ke mi ne konas ties familion en Pazarg'ik por rekte kondolenci kaj esprimi mian profundan respekton por tiu nobla homo. Kiel ajn mi esperas ke miaj vortoj alflugos c'e la hejmuloj kaj epserantistoj de Pazarg'ik kie Petko ege aktivis tutan vivon.
**Bardhyl Selimi**

**Forpasis Georges Lagrange**
Georges Lagrange, esperanto-verkisto, akademiano, franca esperantisto, membro de FEI (Franca Esperanto Instituto) kaj de diversaj Esperanto-asocioj inter kiuj SAT kaj SAT-Amikaro, kungvidinto de la esperanto-centro Kvinpetalo, forpasis hodiaux en Bouresse 75-jaragxa. Biografio : http://eo.wikipedia.org/wiki/Georges_LAGRANGE
Pro la grandega rolo kiun li ludis por Esperanto, temas pri tre grava perdo por la tuta Esperanto-parolanta komunumo. Lia lasta kongreso kun ni okazis en Cap d'Agde; lia sanstato jam malebligis al li partopreni en tiu de La Roche-sur-Yon. Ni kondolencas al liaj proksimuloj kaj al chiuj, kiujn trafas tiu malapero.
**C'erpita de Heroldo Komunikas**

**<u>Politiko</u>**
**Sesio de Klubo de Politikistoj de Balkanio**

Kunsidis en Tirana, Albanio, dum 28-30 majo 2004, la membroj de Klubo de Politikistoj de Balkanio, kies fondinto estas s-ro J'elio J'elev, eksa prezidento de Bulgario dum la unua kvinjaro post 1990. Partoprenis la kunsidon ankau' eksaj prezidentoj de Turkio (Demirel), Makedonio (Gligorov), Albanio (Berisha), kaj aliaj politikistoj el Makedonio, Serbio, rumanio ka. C'eestis ankau' la aktuala c'efministro de Albanio, Fatos Nano. La kunsido elektis denove kiel prezidanton s-ron J'elio J'elev.

En sia parolo Fatos Nano atentigis pri la minacanta fenomeno por la integraj procesoj kaj por la filozofio de la moderna regeco en duoninsulo maltrankvila de Balkanio, nome la malkapablecon de parto de ties politikistoj por alfronti la defiojn de novaj realecoj . Tute malracie akcentis li kelkiuj politikistoj sin turnas al la naciismaj tezoj, rekomencas kaj instigas starig'on de malfekundaj disputoj pri la malbono kvazau' kau'zita de najbaro, kio pro la ankorau' vivantaj pensmanieroj de la pasinto povas dang'ere misuzati. Tamen mi opinias ke ne estas plu tempo por misprofiti malfavore al la najbaro, plibonigante propran imag'on per kaluminiaj'oj kontrau' la najbaron. Lau' li la malfermig'o de la merkatoj ene kaj ekster Balkanio, la globalig'o de la regiono kaj interrilatoj kun la Unuig'inta Eu'ropo, la performitaj akordoj de la libera komerco, plibonig'o kaj modernig'o de koridoroj de la liberaj movig'o estas je intereso regionaj kaj naciaj. Li esprimis sian konvinkon ke la s'tatoj de la regiono ankorau' ne alig'intaj al EU povas realigi tion ene de la jaro 2015.
Sali Berisha en sia parolo menciis kiel c'efan problemon por la balkanaj landoj la liberajn balotojn, starig'on de jura s'tato kaj la batalon kontrau' la organizita krimeco. Aldone li diris ke la difino de la statuso de Kosovo kaj Montenegro, apliko de Interkonsento de Ohrid, liberaj balotoj en Albanio estas same antau'kondic'oj por stabilig'o politika en Balkanio.

**Ni kunvivu!**
Tia estis la c'eftemo de la internacia renkontig'o inter reprezentatantoj de junularaj organizoj el Balkanio kiu okazis majfine, 2004 en Tirana, Albanio.
La evento estis arang'ita de Instituto por Demokratio kaj Perado kaj la Forumo por Interetnaj Rilatoj baze en Belgrado. G'i celis la starig'on de longviva reto de junaj gvidantoj el la landoj de la regiono, kiuj per periodikaj renkontig'oj alportos novajn ideojn por promovigi la progreson de balkanaj landoj. Dum la renkontig'o oni pridiskutis la pas'ojn al la intergrig'o al NATO kaj EU. Krom reprezentantojn el Albanio, alvenis ankau' tiuj el Serbio de la organizaj'o OTPOR kiu rolis notinde en la falig'on de Milos'evic'a reg'imo, j'urnalistoj , juristoj kaj studentoj el Montenegro, Kosovo kaj Makedonio. Partoprenis g'in ankau' profesoro Dus'an Janjic' el Fakultato de Sociologio de Belgrado, fondinto de Forumo de Interetnaj Rilatoj, kaj eksperto pri la aferoj de Kosovo.
La eksa prezidento de Albanio, Rexhep (Redj'ep) Meidani alparolis al gejunuloj konstatante ke malgrau' problemoj diversaj survoje al EU, serboj, albanoj, makedonoj kaj montenegranoj nun kunsidas c'irkau' rondformaj tabloj kaj pridiskutas la komunajn aferojn. Li plifortigis la ideon de George Sorros lanc'ita en Davos (Svisio) pri estig'o de iaspeca "Balkana S'engeno", do iaspeca ekonomia spaco bazita sur reciprokaj interkonsentoj. Tiu ideo kontrau'starigita jam de BE ekestig'as jam. La partoprenantoj opiniis ke pli bone estus ke oni integrig'u al EU kiel tutan regionon, plialtigante la aferismon kaj liberan komercon en si mem. La gejunuloj prisdiskutis ankau' la problemon de organizita krimeco en la regiono. La analaisto albana Fatos Lubonja prelegis pri la temo "La nacia identeco , etna kaj religia tolereco".
La gejunuloj estis akceptitaj ankau' de la aktuala prezidento albana Alfred Moisiu kiu alvokis ilin: batalu por ke nia regionon ne plu trafu la militoj! Li nomis la partoprenantojn "hirundoj de la futuro" kaj esprimis sian plezuron ke serboj kaj albanoj renkontig'as kaj kundiskutas. Germanio kaj Francio intermilitis 200 jarojn, aldonis li, sed vidu ilin hodiau', ili ja ne nur kunvivas sed ankau' kunlaboras fruktodone. Albana proverbo diras: la amikon oni povas elekti sed la najbaron ne, tiun donas al vi Dio. Ni sekvu la ekzemplon de tiuj du popoloj (germanoj kaj francoj)- konkludis li.

**Bosniano en Tirana**
La sanguma milito en Bosnio komencig'inta en la jaro 1991, kau'zis verajn tragediojn al centmiloj da homoj tie. Unu el ili estas Aleksander Kukic', nun 39 jaro viro, finstudinta en Sarajevo en Akademio de Belaj Artoj. Perdinte lian patrinon kaj gefratojn li fug'is al Albanio kaj restis en Tirana ekde 13 jaroj. Komence tute malfelic'igita li pasigis la tagojn farante c'iaspecan simplan laboron , jen en panbakejo, jen en picejoj, jen vendante uzitajn vestojn kaj s'uojn surstrate ktp. Li eklog'is kaj dau're log'as en kabano de iu neuzita kamiono c'e la Granda Infanludejo sude de la c'efurbo, apud la artefarita lago kaj granda parko. Kutime li prizorgas la ludejon kaj esperas trovi pli bone pagatan kaj dignan laboron kaj eventuale log'ejon. J'urnalistoj de la renoma privata TV kanalo KLAN renkontis lin kaj intervjuis la 18an de aprilo 2004. La historio de Aleksander rememorigas la homoj ke la sekvaj'oj de la militoj en eksa Jugoslavio ankorau' ne malaperis.

**Bardhyl Selimi**
**<u>Albanaj eminentuloj</u>**

**Brilanta dramaktoro**

Fruaprile 2004, Albanio rememoris sian grandan dramaktoron, Aleksander Moisiu, naskig'inta 125 jarojn antau'e. Nur 25 jarojn da sceneja vivo sufic'is al Moisiu por ekbrili en la c'ielo de la monda arto. C'irkau' 200 figuroj kaj personag'oj, c'efe el au'toroj kaj verkoj konsistigantaj kulminojn de la monda dramaturgio, estas ja la ora kaj eterna krono de tiu neripetebla titano. Lia arto estis magia. Siatempe, la plasteco de movoj, penetrantaj okuloj, melodieca voc'o –tiuj raraj kvalitoj de la albana artisto, jam rigidigis kaj mutigis Kaincon- faman alian germanan dramaktoron antau' la Unua Mondmilito.
Aleksander Moisiu naskig'is en Trieste, 2an de aprilo 1879. Lia patro, Moisi Moisiu, komercisto, estis albano el Kavaja, urbeto je 65 km far from Tirana, translokig'inta en Trieston en la jaro 1860. La patrino, Amelia de Rada, estis albandevena civitano el Italio. Kiam Aleksander farig'is kvarjara, familio revenis portempe en Albanion. Tiel, juna Moisiu la elementan lernejon finigis en Kavaja. Tutan vivon, li rememoris tiun urbeton nostalgie. 17 jarag'a Aleksander eklernas en gimnazio en Grac, Au'strio. Je 1899 li revenas en Durres, havenurbo, apude de Kavaja, por partopreni la geedzig'an feston de fratino Melanio. Du semajnon poste, li forirus porc'iame de Albanio.
20 jara Moisiu kaj la patrino translokig'is en Vienon. Tie li sin prezentis antau' la ekzamenkomisiono en konservatorio de Vieno c'ar li forte deziris farig'i kantisto, sed lia patrino estis sugestita ke "la filo povas farig'i kiu ajn, sed ne artisto!". Tiam, juna Moisiu komencis perlabori la vivon en Burgteater kontrau' malgrandan salajron. Iun tagon doktoro S'lenter petis lin prezentig'i antau' la komisiono de estraro de Burgteatro. La komisiono konsistis el Sonental, Levinskij, Bermajster, Hartman ka aliaj distingitaj artistoj. Diskutinte, c'iuj membroj notis en iliaj paperetoj: "Aleksander Moisiu estas malkapabla por aktoro".
Sed la sorto helpis al la estonta famulo. Neatendite, Kainc (Jozef Kainz, 1858- 1910), c'efaktoro en unu dramo je rolo de Tartufo, kontraustarante antau' Moisiu, ludinta servutulon en la scenejo, ege impresig'is pro la mieno, rigardmaniero kaj movebleco de Moisiu, g'is tiu grado ke li ec' ekhavis problemon pro sia bu'so .Tiumomente, li malkovris grandan aktoron estontan kaj Kainc decidis protekti kaj helpi Moisiun. Li skribis: "Oni faligis Moisiun en la ekzameno, probable c'ar li ankorau' ne parolis flue la germanan, probable c'ar li uzis la akcenton de Triesto. Tamen, tio ne gravas por mi, c'ar mi mem lernigos al li la germanan. Vi ja certe ekvidos, sinjoroj, ke lia ekzotika akcento donacos novajn sonojn al la germana. Lia vizag'o, liaj okuloj, lia rigardo, lia figuro estas tre tau'gaj por aktoro!"
Kaj g'uste Kainc kiu ne povis rezisti al la sag'a kaj viveca rigardo de Moisiu, tiun vesperon en la scenejo, postulis insiste ke oni akceptu Moisiu kiel aktoron. Tri jaroj da pasia kaj kontinua laboro kaj studado rekompencis junan aktoron per felic'o de sukceso. En la jaro 1902 li interpretis je granda eh'o en Prago en la dramo "Trans niaj fortoj" de Bjornson. La publiko de Praga vidis unuafoje artiston interpretanta siamaniere, aktoron je sonoriga kaj bela voc'o. Hans Bohm, j'urnalisto tiutempe, skribis: "Rolon de Elio ludas Aleksander Moisiu. Tiu c'i juna artisto, antau' tri jaroj, ne posedis ec' la germanan, sed nun li povas sin dedic'i al la germana drameca teatro."
Alia kritikisto, Emil Faktor skribis pri li: "Moisiu skuigis la publikon de Praga al kiu li estis tute nekonata."
Moisiu revenas en Berlinon por ludi en grandaj scenejoj. Tie lin ege subtenis la fama reg'isoro Max Reinhard ( Maks Rainhard, 1873-1943). La germana arto tiutempa vivis per famaj aktoroj Beserman, Sonetol, Kainc, Hartman, Levinskij, ka. En la premiero de "G'enovefo", ludante la rolon de Golo, Aleksander montris melodiecan kaj multkoloran deklamon. Poste li interpretos Franc Mor-on en la verko de S'iler "Malleg'uloj". La rolo, je lia interpretado, kau'zis multajn

emociojn kaj ardajn diskutojn. Kelkaj admiris kaj lau'dis lian interpretadon , aliaj malalu'dis tion. Moisiu retenis sin en lian c'ambron , silenta, konfuzita, emociita. Li ec' ne pensis ke c'io okazis pro lia interpretado. Li sidis kun la s'nuro c'irkau' sia kolo, kiel en la sceno de pendig'o, kaj ekvidis ke la sango ekfluis el lia manplato. Li do estis vundita pro freneza kolerig'o, kiam li estis klopodinta algrimpi la akrajn murojn de la scenejo, kie ne mankis ec' najloj...Rigardante la sangerojn, li ekpensis: "Eble oni neniam komprenos min, sed au' admiros, au' malamos min!"
Gerogebo Herman komentis tiel la spektaklon: "La spektaklo estis malbela. Se estus tiel ankau' en Main en la tempo de S'iler, hodiau' neniu ekkonus la nomon de tiu c'i verko. Sed c'ifoje estis ja unu Franc Mor pri kiu parolos la mondo."
Je 1905-1906, Moisiu interpretas aliajn rolojn en la dramoj "Elektra", "Song'o de somernokto", "Edipo kaj Sfinkso" ka. En la jaro 1911 li akompanas la trupon de Resinhardt en Rusion, kie li estis ege aprecata pro la rolo de Edipo.
Kvankam dramaktoron, Moisiu partoprenis ankau' en 15 artaj filmoj, realigitaj dum la periodo 1910-1935, el kiuj sep estis senvoc'aj. Li vojag'is en aliajn kontinentojn, aplau'dita entuziasme de milionoj da adorantoj de arto kaj lia artisma genieco. Lia ludo en la roloj de Romeo kaj Hamleto, de S'ekspiraj verkoj "Romeo kaj Julieta" kaj "Hamleto" respektive, Mefistofelio de "Fau'sto" de Gete, Dantono de "Morto de Dantono" de Buhner, Bufono de "Reg'o Lir", Fedja de "Viva Kadavro" de Leon Tolstoj estas ja artismaj kulminoj.
Kelkaj elstaraj kritikistoj priskribas brile la interpretan arton de tiu granda dramaktoro. Tiel, Robert Musil diras: "Li ludas ne Hamleton kiu tro pripensig'as, nek metafizikiston, nek iun "Mi-on" disdividitan au' ne? Sed simple nobelulon, kiu farig'us heroo se la sorto lin trafinta estus malpli peza por lia juneco. Li amas sian patrinon sed li devas malestimi s'in, li sentas nau'zon por lian kvazau'patro, sed li ne povas mortigi lin tuje pro tio! La sceno de fantomo nature okazas kiel ia interna voc'o. C'e la renkontig'o kun liaj kolegoj -studentoj li momente plijunig'as. Tuto tio havas la brilecon de granda kaj malluma temperamento rimarkebla c'e tiu Hamleto.Li ne klopodas, li estas..La ekzisto de granda aktoro estas ja: algrimpi per la ekzemploj..tial lia aktoreca arto malplenig'as tiom facilmaniere, de imito post imito, senanime, viglece, malamikece al la arto. G'i devas revivig'i de aktoroj kiel Moisiu kiuj ja scipovas legi la tekston".
Maks Brodi, alia kritikisto, skribis: "Hamleto estas ja verkita por Moisiu kaj Moisiu estas naskita por interpreti Hamleton!".
Pri la rolo de Romeo, Musil komentas: "Moisiu subigas la figuron. Li ludas sudlandan fraton de sia Hamleto, iun malflegman kaj malprudentan, sed pli memcertan kaj erotikan..La simileco estis ne en la spirito, sed en la karno, en la voc'o, en la subkonscio, en la rando de la vido..Sed tian Romeo-n, sindedic'ita per moderna peno, S'ekspiro ne povus priskribi facilmaniere".
Dum pri la rolo de Otelo, la sama kritikisto rimarkigas: "Otelo estas figuro konstruita sag'ece , estas ja kapablo por malmunti kaj pritrakti aparte la karakteron, la forton de la talento, kiu ofte atingas tiajn dimensiojn, kiujn ni "devas agnoski ec' kiam ni ne komprenas ilin".
Jen kion skribas Aleksander Moisiu pri si mem: "C'u vin interesas scii kiel mi interpretas? Mi senvestig'as tute de mia personeco kaj survestig'as kiel mia personag'o interpretota. Mi neniam mensogas kiam mi ludas. La personag'o enspiras kune kun mi. Hamleto, Fedia, Posa kaj Dubedot estas ja por mi. Mi kunvivas kun ili , pasigas la tempon kun ili, kunridas kaj kunploras kun ili, mi ec' dividas same la emociojn kaj suferaj'ojn kun ili. Ilia kanzono estas ja la kanzono de mia vivo.."
Kvankam farig'inte famulo tutmonde, Moisiu neniam forgesis sian patrion. En la jaro 1934 li petis ties registaron por ricevi albanan pasporton, forte deklarante: "Mi estas albano!". Sed,

malfelic'e, jaron poste , je 22an de marto 1935 Moisiu mortis kaj entombig'is c'e la Lago de Luzano, Svisio.
Aleksander Moisiu estas viva modelo de granda arto, trans c'iuj skoloj kaj torentoj, estetikaj difinoj kaj kategorioj, arketipo de geniulo, c'iam komunikig'ema kaj juneca, ia magieco de sceneja arto dau'ranta..
**Bardhyl Selimi**

## SCIIGOJ

### Turisma oferto

**From:** Jelescu Cristina [kristyna6ro@hotmail.com]
**Sent:** Wednesday, March 24, 2004 10:13 AM
Estimataj gekolegoj, Mi devas informi vin, precipe internacian turisman Klubon-Esperanto ke mi povas gastumi grupon turisman pere 6 da euroj po tage kaj persone en cxambro enhavante 4 da litoj, necesejo kaj dusxjo sur koridoro en urbo Brasov – Rumanio. La turistoj povos ripozigxi kaj viziti naturbelecojn, cxar Brasovo trovigxanta inter montaroj, viziti Delton de la Danube kaj pere pramo atingi Turkujon (marbordo de la Nigra Maro). Devas ke mi esti anoncata antau kun 2 semajnojn utilante e-mailon mihai_stefan_esperanto@yahoo.fr au portebla telefono no. 0040 / 722830123. Suplimentajn informojn vi povas havi cxiam-ajn.
Amike,
**Stefan Mihai**

### Sciigoj de Klubo "Esperantotur"

Vojagxu al Esperanto-arangxoj 2004 !
Internacia Klubo "Esperantotur" en Bydgoszcz, Pollando sendis du busojn dum 28 aprilo-11 majo 2004 por **"AROMA JALTO-2004"**. Inter 117 partoprenantoj de AJ el 6 landoj – 67 estis turistoj de Internacia Klubo "Esperantotur", kiuj, krom Krimeo – Jalta, Sevastopolo, Bachchysaraj, Gurzuf, Livadia, Alupka, Simferopolo vizitis ankau Odesson , Kievon kaj Lvivon. Nun ankorau eblas vojagxi por:
**15-a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio kaj Murcio** kiu okazos en Cheste(Hispanio) dum 29-30 de majo 2004 Pliaj informoj cxe Augusto Casquero de al Cruz: augustocasquero@infonegocio.com
**14-a Europa Esperanto Forumo** en Benelukso kun Parizo dum 11-18 junio 2004
kun vizito en Europa Komisiono en Bruselo. Arangxas Marcel Delforge: mardelforge@busmail.net Gxin partoprenos buso de Internacia Klubo „Esperantotur" kun polaj folklorensembloj „Mareski" el Kasxubio kaj „Krajna" el Kamien Krajenski
Sukcena Itinero tra Litovio – Latvio Dum 2-11 julio 2004 busvojagxo kun ebleco viziti 57 IKUE-Kongreson en Kretinga kaj 40 BET en Birsxtonas, Litovion Pliaj informoj cxe: info@esperanto-turismo.com
1-a Kongreso de Internacia Esperanto Turismo en Malbork Dum 17-21 de julio 2004

- en fama pola urbo Malbork kun la plej granda en Europo mezepoka brika kastelo de Kruckavaliroj, kun tre favoraj partoprenkondicxoj – ekde 50 Euroj por la tuta arangxo kun tranoktoj.

Pliaj informoj cxe Augusto Casquero de al Cruz: augustocasquero@infonegocio.com Tuj post la Kongreso en Malbork Vi povas flugi al:
**14 Internacia Esperanto-Kongreso** en Cxinio dum 22 julio gxis 20 de augusto 2004 por partopreni ne nur la 89-an UK en Pekino, sed vojagxi en internacia E-etoso tra tuta Cxinio: Pekino –Tianjin- Xi'an-

Tibeto- Chengdu- Chaongquing- Krozado lau Jangcy-rivero – Shashi-akvobarilo - Wuhan- Hefei- Suzhou- Hangzhou- Shanghajo- Kantono- Macau- Hongkongo.
Vi povas elekti inter 7 variantoj troveblaj cxe la hejmpagxo: www.esperanto-turismo.com elektu “vojagxu” kaj kliku „programon“ de la 14 IEK – 22.07-22.08.2004. Reveninte el Cxinio, atendas vin busvojagxo de Internacia Klubo „Esperantotur“ al **6-a Europ-Unia Esperanto Kongreso en Bilbao** dum 22 augusto – 1 septembro 2004 tra Germanio-Benelukso-Francio-Andoro gxis Bilbao en Hispanio. Pliaj informoj cxe: www.esperanto-turismo.com . Fine septembre atendas vin **Vojagxo tra 15 landoj de Karaiboj** kun mondvojagxanto prof. Remigiusz Mielcarek
pliaj informoj: info@esperanto-turismo.com Autune vi povas ekstudi kune kun jam aligxintaj gestudentoj el 12 landoj **en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz – Klerigejo de AIS.** Cxiuj informojn vi trovos cxe: www.esperanto-turismo.com elektu kaj kliku „studu”. Bonajn vojagxojn deziras al Vi Internacia Klubo „Esperantotur”

La Liceo Pierre Mendès-France de La Roche-sur-Yon, kiu akceptos la 59an kongreson de SAT-Amikaro de la 10a ghis la 12a de aprilo, dum Pasko, estos ankau la rendevuloko de junaj paroj, kiuj kalkulis pri Esperanto, kiam ili entreprenis longdaurajn vojaghojn tra la mondo :

- Gudule Le Pichon kaj Laurent Cuenot, kiuj vojaghis chirkau Europo (16 landoj) en rulhejmo dum 5 jaroj kaj duono kun infaneto che la ekiro kaj du che la reveno;-)
- Rachel Prual kaj David Cholet, kiuj vojaghis dum 23 monatoj petveturile chirkau la mondo (36 landoj); ili prezentos lumbildmuntajhon en La Roche-sur-Yon la dimanchon 28an de marto ekde la 15a horo (13, strato de la République);

Maryvonne kaj Bruno Robineau, kiuj efektivigis 8-jaran vojaghon chirkau la mondo kaj kiuj, aparte de tio, restadis ankau en Rumanio; ili publikigis du librojn, kiujn ili dedichos okaze de la kongreso : "Huit ans autour du monde" (ok jaroj chirkau la mondo, t.e. nova titolo de la kvara eldono de "Et leur vie, c'est la terre", multe pli riche ilustrita per 54 fotoj) kaj "Sur les sentiers des Carpates" (sur la padoj de la Karpatoj). Tiu chi vojaghmaniero per Esperanto kiel lingva "bagagho"[kunportajho] shajnas kontagha, char ankau alia juna paro ekirinta el Francio en 2003, vojaghas nun chirkau la mondo (vd, en la franca : <http://dessinemoiunchemin.free.fr>), kaj emerita Bretono, Zéphirin Jégard (Zef), ekiros la 1an de majo de Brest por atingi Vladivostokon per biciklo (14 000 km; 200 km chiutage !). Cetere, juna jhurnalisto, François Picard, ekiros en aprilo de Odessa (Ukrainio), ankau bicikle, por ating Tashkent (Uzbekio). Lia ttt-ejo <www.3600km.net> estos trilingva : franca-angla-Esperanto. La Esperanto-Klubo de Samarkando jam sciigis ke li estas atendata. La infanoj ghuos senprecedentan atenton en tiu kongreso. De la 9a ghis la 12a jaro, ili povos eklerni Esperanton la dimanchon kaj la lundon. Estos vartado por la plej malgrandaj; ludoj, promenadoj, videospektado kaj aliaj aktivajhoj por la meza aghotavolo, kaj banejo por chiuj. Iliaj etaj geamikoj estos Vincent, la Boliviano, kaj Sarah, la Vjetnamanino, t.e. infanoj, kiujn adoptis Maryvonne kaj Bruno Robineau, kaj ankau Lola kaj Romain, la infanoj kiuj havis tute apartajn vivspertojn kun siaj gepatroj Gudule Le Pichon kaj Laurent Cuenot. ATENTU ! : la tarifo de enskribigho al la kongreso plialtighos je 8 euroj ekde la 17a de februaro, kaj ree 8 euroj ekde la 9a de marto. Kvankam ne indikite, la duontarifo por gejunuloj de 15 ghis 25-jaraghaj aplikighas ankau por la senlaboruloj. Infanoj ghis la 14a jaro inkluzivita ne pagas ghin. Dudek kvarlitaj chambroj je avantagha tarifo ebligas moderkostan tranoktadon por la gejunuloj kaj por familioj en la liceo mem, do surloke, kondiche ke tranoktado kun aliaj estu akceptata. La alighilo en PDF-formato estas elshutebla el la sekcio "SAT-Amikaro/Servoj" de <http://www.esperanto-sat.info> sub la blinkanta kongresanonco. Vd ankau la kongreskomunikojn char tiu kongreso estas multfaceta, multe pli malfermata al la

publiko ol la antauaj.

**Sciigo de Manfred Westermayer**

**20 Jaroj - Asocio de Verduloj Esperantistaj**
Gratulon & Dankegon al cxiuj kunlaborintoj
Karaj verdaj gesamideanoj, ni devus fari grandan komunan feston okaze de nia 20a "naskigxtago". Tiel ne eblas; pro tio ni festos plurfoje. Cxiukaze grandan dankon: unue al la fondintoj de AVE; due al tiuj kiuj verkis artikolojn, partoprenis la diversajn renkontigxojn kaj provis konvinki la diverslandajn verdajn partiojn kaj movadojn; kaj trie al vi cxiuj - sen membroj asocio ne eblas; kaj kvare ni ne forgesas tiujn samideanojn kiuj subtenis nin diversflanke: kuna agado cxe terminologiaj demandoj, cxeesta helpo je informotabloj okaze de kongresoj de la Verdaj Partioj, kuna diskutado de niaj rezolucioj kaj ecx al nia konkurenca ERA, kiu kelkfoje estis pli sukcesa kaj tiel subtenis nian ideon cxe la Verdaj Partioj. Dank' al nia dauxra kunlaboro Esperanto ekzistas ene de la Verdaj Partioj en la tuta mondo, kaj ecx en landoj kie Verda Partio ankoraux ne ekzistas. Do - tute koncize: elkoran dankon al cxiuj - kaj ek al plia agado. Redakta noto: Aveno 28 entenas ankaux artikolojn de #27, cxar gxi estis disdonita nur dum la kongresoj en 2003 kaj krome publikigita en nia TTT-ejo.
Mi bonvenigas novajn interesulojn kaj AVE-membrojn. Nia statuso rilate la Verdaj Partioj plibonigxis cxar pliaj partianoj el Francio, Germanio kaj Makedonio aligxis al AVE.

**Deklaracio de la Ekologiisma Frakcio de SAT:**
Agnoskinte la influon de la homa agado sur la cxirkauxantan medion kaj al la ekspluato de la resursoj de la tero kaj la interdependenco rilate la tutmondigxon ni konstatas, ke necesas pripensado de racia, efika, sanrilata agadmaniero politika:

1) Rilate la Transporton:
- Eviti transporton lauxeble, prefere uzi vagonaron sur reloj anstataux kamione sur stratoj.
- Preferi regionajn produktojn.
- Subteni la evoluon al tauxga publika trafiko, inkluzive eksterurban parkadon.
- Provizi adekvatajn, sekurajn biciklo-vojojn.

2) Rilate la Medion:
- Ni bonvenigas la EU-Komisionon kiu maplpermesis la uzon de persistantaj kemiajxoj (la "malpura dekduo": DDT, PCP, Atrazin, ...).
- Amendi la Euratom-Kontrakto, kiu apartenos al la nova konstitucio de la Euxropa Unio: forlasi la atomenergian vojon, kaj zorgi pri la problemo de radioaktiva rubajxo.

3) Efika Uzado de Resursoj:
- Reuzado kaj reciklado de materialoj:
- Subteni la aplikadon de alternativaj energioj, inkluzive la efikan uzadon de elektra kurento kaj izolado de konstruajxoj.
- Redukti la utiligon de papero por profitcela varbado.

4) Rilate Saniga Nutrajxon:
- Preferi la organikan agrikulturon al uzado de kemiajxoj.
- Ni bonvenigas la novan decidon en la EU, redukti la subvenciadon de amasa agrikultura produktado, sed preferi subtenon laux la prizorgata areo (nuntempe cxiu sxtato rajtas elekti la manieron de subvenciado).
- Ne riski la uzadon de GMO (Genetike Modifitaj Organismoj).
- Atentigi pri post-efikoj sekve de aplikado de dangxeraj metodoj.
- Subteni statistikon pri kanceroj, por ekkoni tiajn post-efikojn.

Krome ni partoprenis la Socian kaj Politikan Forumon, kies enhavo kaj rezulto ankaux rilatas al la Verda Politiko, do koncize:
* Malpli da homoj en la sindikatoj (pro diversaj kauxzoj; burokrateco & perditaj strikoj).
* Nejusta divido: 349 homoj posedas 45 % de la valorajxoj de la mondo.
* Liberalismo, liberecano: ne miskompreni la terminojn.
* Malfortigado de la sociala reto (plialtigo de la agxo por pensiigxi, ktp.) en Germanio, Francio, Britio, Hispanio, Svisio.
* Konekseco-principo: sxtato kiu ordonas legxojn cele la urbojn devas provizi ilin per mono.
* Sxtato / Universitato prenas pli da mono de siaj studentoj en kelkaj landoj.

**Praktika Agado de AVE**

AVE subtenas la asocion Aral-See-Hilfe, kiuj nun subtenas infano-departementon en la tuberkulozo-malsanulejo "Sultanov" en Nukus/Karakalpakio (UZ) kaj surloke kunlaboranta kun NRO "Central Asian Free Exchange" (CAFE Nukus). Temas pri duonjara renovigo de 60 cxambroj, lavejoj kaj necesejoj, centra provizo de varma akvo. La kuracistoj de la Sultanov-tuberkulozo-Centro dankas al cxiuj donacantoj (tio eblas ekz-e pere de la AVE-konto cxe UEA: avex-z (kun la rimarko "Aral")
Ni tradukis gxeneralan pagxon de la regiona germana brancxo de la Amikoj de la Tero (BUND). Tie vi ankaux trovos pli detalan informon pri la riskoj de GMO (Genetike Modifitaj Organismoj) - kaj sub Mozaiko. <www.bund-freiburg.de> kaj angle <www.bund.net>

**Filozofio de AVE:**

Renato Corsetti skribis: " Manfred, mi samopinias, kun multo, kion vi diras. Sed se estas vero ke Cxinujo komencas sekvi la usonan vojon: 'Mi konsumas, sekve mi estas'. Cxu celo de AVE kaj de la listo Verdverd kaj gxenerale de ekologiistoj ne estus batali kontraux la fonto de la disvastigo de tiu nova sinteno? "
Kio estas la "fonto de la disvastigo .." ?
La plej gravaj fontoj estas:
1-e La homo mem emas altiri al si cxion eblan al bonfarto, necesas bremsi tian egoisman emon kaj agadon. Pro tio oni "inventis" religiojn, legxojn, socian framon moralon.
2-e La "kapitalo", do konzernoj havas la saman emon, cxar ili estas gviditaj de homoj; sed ilin ne bremsas la religio - do necesas forta framo da legxoj. Homoj klopodas plibonigi siajn vivkondicxojn, sed konzernoj klopodas plibonigi la legxojn - kaj pri moralo ili nur zorgas, kiam la publiko unue scias kion ili faras

(dank' al Greenpeace/ VerdPaco k.a.), kaj due kiam la publiko vidas eblecojn bremsi ilin (dank' al tauxgaj legxoj kaj nekoruptaj oficistoj). Ni vidis la ekzemplon de Shell, post la agado de VerdPaco k.a. ili komencis zorgi pri "verda" folio, sed ne sxangxigxis entute, kion ni povas vidi (aux ne vidi) kio okazas en Nigerio. La ekologiistoj klopodas vidigi la propran rajton de la naturo. Naturo ne estas donita al ni de Dio por forkonsumi, sed ni homoj estas parto de la naturo - sendepende cxu ni kredas, ke Dio(j) kreis la naturo, cxu la vivoprincipo de la naturo mem kvazaux estas Dio.

AVE ne batalas kontraux tiuj fontoj de disvastigo, sed batalas por: tauxgaj legxoj sur fono de vivorajto de cxiu vivantajxo - akceptante la eternan "legxon", ke iu mangxas la alian laux bezono kaj ebleco. Vi certe scias, ke animistoj (en Japanio, k.a.) kaj aliaj indigxenoj senkulpigas antaux la mangxo, ke ili mangxas ion vivantan. Di-kredantoj pregxas kaj dankas al la Dio ke gxi "donas" la mangxajxon. Je la fondigxo, en 1984, AVE akceptis kiel sia Verda Filozofio la frazon (de D-ro Wolfgang Guenter): Realigo de pensado kaj agado laux la principo, ke la vivo kaj ne la homo devas esti la centra kaj pivota punkto de cxiu evoluo sur tiu cxi planedo.

**Mozaiko, Pozitive kaj Negative**

> GMO: Industria agrikulturo sxatas enkonduki novajn organismojn, kiuj estas modifitaj genetike. Ekz-e oni enkondukas genetikan informeron el bakterio (BT) por ke majzo igxu rezistema kontraux insekto, aux alia por ke la majzo igxu nesentema kontraux herbicido (sama firmao produktas la herbicidon kaj la majzo-semgrenojn) aux el fisxo por ke fragoj ne detruigxu je frosto. Plej dangxera estas risko kiu ne tuj montrigxas; sed jam oni scias la jenajn:

- para-nuksa geno en soj-fabo kiu kauxzas alergian sxokon en sentema persono; kompreneble oni haltis tian produktadon.
- esplora nutrado de ratoj pere de GMO terpomoj kauxzis malbonajn sxangxigxojn en la reno kaj sango.

Oni ne povas preventi la interkrucigxon inter kolzo GMO-a kaj natura. Abelbredisto ne povas deklami la produktitan mielon GMO-libera. Ekonomia problemo ankaux gravas, cxar temas pri patentoj. Bienistoj de jarmiloj kulturas semojn, de jaro al jaro. Cxar la GMO-plantoj staras sub patento-protekto; oni devas pagi licenc-kotizon aux acxeti novan semajxon cxiujare. Tio signifas kvazaux re-sklavigon de la bienistoj nun sub la jugo de internaciaj konzernoj. Usono devigis la EU-Komisionon liberigi la merkaton kun GMO-produktoj. La sola defendilo estas, ke cxiu produkto devas montri la enhavon de GMO, sed ne kiam porkoj aux bovoj estis nutritaj per GMO-majzo, ktp. . Do, iometa risko restas, ecx se acxetanto per lupeo rigardas la produkto-etikedon. Ni aligxu al la protestantoj kaj almenaux elektu kiam ni acxetas nutrajxojn.

**Klimato/ Resursoj**

En Germanio okazas stafeto por protekti la klimaton, organizita de la Klimato- Alianco. Gxi finos la 1a de Juni okaze de la Konferenco pri Renoveblaj Energioj en Bonn (DE). Indigxenoj el la pluvarbaraj regionoj akompanas la stafeton. Ili protestas kontraux la ekspluatado de teroleo en ekologie malstabilaj zonoj, aparte en la pluvarbaroj. Do, ne nur temas pri la klimato post la bruligo de teroleo- kaj gaso, sed jam komence pri la detruoj okaze de la ekspluatado. Vi rememoras la fi-agadon de SHELL en Nigerio. Mi legis sub www.YUKOS.com ke ili volas resanigi la detruojn (jam farita dum sovetiaj tempoj) en nord-okcidenta siberio kaj ke ili atentigxas eviti poluadon de tero kaj akvo. La uzado de teroleo altigxas pro la ekonomia kresko en Cxinio k.a. evoluantaj landoj. Kompreneble ili ankaux rajtas evoluigxi. Sed ni cxiuj devas klopodi vivi kun elcxerpeblaj resursoj, kaj efektivigi la enerio-uzadon. Preferble ni investu en renoveblaj energioj. Suno, akvoforto (sub ekologiaj framokondicxoj), vento (kei eblas), biomaso; kaj aparte redukti la uzadon de resursoj. Acxeti novan produkton povas esti bone, se gxi bezonas

malpli da energio kaj kondicxe ke oni recikligas la uzitan materialon. <www.klimabuendnis.org>

**Migrantaj Birdoj / Sovagxaj Bestoj en Irano:**

Lasta tempe mi kune kun aliaj preskaux 20 geamikoj veturis al nordo ke Irano, apud Sari, por rigardi kaj gxui migrantajn birdojn. En Irano ni havas kelkajn gravajn lokojn al kiuj cxiujare alflugas milionoj da migrantaj birdoj, nome Mijankale, Ferejdunkenar, Samanskale (?) Ni helpe de Ekotur kiu okupas pri arangxado de rondvojagxoj - precipe por konatigxi kun medio diversflanke, kaj helpe de regionaj verdaj organizajxoj vizitis Dasxt-e Naz kie oni prizorgas flavan iranan cervon kaj Mijankale marcxo. Fakte okaze de Internacia Tago de Marcxoj (2a de Feb-o) helpe de kelkaj regionaj verdaj organizajxoj oni okazigis 'Birdajn Festojn' en naturparko de Mijankale kie estas la ununura ejo por rozaj flamengoj. Flanke interesa estas ke ili interesigxis pri Esperanto kaj venonte D-ino Karimi intencas plenumi kurson por ili surloke. (laux raporto de Fatemeh Solat, Irano).

**MONDA SOLIDARECO. Bulteno de la Monda Fonduso de Solidareco Kontraux la Malsato.**

Praktikaj aktivecoj en Afriko kaj (en #79) pri la Kongreso de la Popoloj. <www.globidar.org/solidareco/monda_solidareco.htm>

> "Ni Haltu la Fumadon kaj Gajnos"

Mi ne havas ideon pri la kvanto da fumantaj geesperantistoj ekzistantaj, sed same mi informas pri la cxisuba mondkonata konkurso. Gxi ekzistas tra la tutan mondon, kaj malgraux ekzistas unu solan internacian premion, ankaux cxiu lando havas aliajn malsimilajn premiojn, do, tiuj eblaj interesuloj, bv sercxi sian propran landon.

Cxu ne estus bonega novajxo ke fumanta esperantisto gajnu tiun internacian premion? kaj plibone, ke gajnu sanon.
"Haltu gxin kaj gajnu!" estas Internacia Konkurso por plenkreskuloj faronta cxiun 2an jaron; la sekva limdato estas Majo 2006. Cxi tiu saneca konkurso faras ke personoj el cxiuj partoj el la mondo konkuras klopodante abstini fumi aux mangxi tabakajn produktojn dum 4 semajnoj apogita de la Monda Organizo pri Sano. (laux Sandra Burgues) (UY)
2004-08-09/23, "ecotopia" estas ekologiemula tendaro cxiujara (alterne en orienta kaj okcidenta ewropo), organizata far EYFA (european youth for(est) action). Cxi jare gxi okazos je sxtat-arbar-tereno "slot (kastelo) loevesteijn"(pr: luvestejn) (NL) Esperanto-informoj en pluraj lingvoj - (nl,de,en - aliaj dezirataj). La kotizoj estas kalkulataj law "eco's", t.e. varias law logxlando. Por anoj de ricxaj landoj antawvideble estos 5 ewroj tage aw io tia, kaj tio entenas la mangxajxojn - kaj kunlaboron de cxiuj (cx. 500 partoprenantoj). Bonvolu viziti: <www.ecotopia.nl> kaj <www.eyfa.org>, (laux Ronaldo Nobel)
Esti cxielarko - raporto el Utopiujo. Cxu vi konas la cxielarko-renkontigxojn? Cxu ne? Cxielarko-renkontigxoj ("rainbowgatherings") estas konkrete vivata utopio:

**Novajxoj el la Verdaj Partioj**
**Albanio:** Verda Partio "Te Gjelbert shqiptare" fondigxis en 2001 kaj estis akceptita de la EFVP dum la konsilio en Luksemburgo. Simpatia virino, Davida Pertena prezentis gxin. Ili protestis kontraux donacita sendajxo de GMO majzo el Usono. <d_pertena @ yahoo.com>
Amike salutas Manfred Westermayer Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) – sekretario Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen 2003-10-20 (Aveno27 n.k.): www.comlink.apc.org/ave/welcome.htm

**Sciigo de Boj'idar Leonov**
Karaj Geamikoj,Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista/TOLE/, AIS- Bulgario,Bulgara E-Asocio, Internacia Universitato Karlovo, kune kun aliaj religiaj organizaj^oj en Bulgario organizas en Karlovo /02-06.06.2004 / Internacian Simpozion :" La religio kaj la homaro kontrau^ la terorismo" Ni dezirus prezenti al la homaro,ke ni,la kreduloj, sendepende de nia religia aparteneco agas kontrau^ la terorismo.Dum la lastaj tagoj de la Simpozio,kiam en Karlovo oni festos la Nacian Feston de la Rozoj,ni organizos kulturan Festivalon de religia kanto kaj muziko.Tio estos la unua religia ekumena arang^o en Bulgario post la longa reg^ado de la ateismo kaj ni estos tre dankemaj al Vi, se Vi partoprenonte morale helpos al ni ! Nun mi uzas la okazon inviti Vin Partopreni la Simpozion kaj la Festivalon.Mi petas Vin., Se Vi akceptas nian proponon sciigu nin g^is 26.05.2004.Plezure ni sendos pli konkretan informon al la interesuloj. Kun plej koraj salutoj atendante Vin en Karlovo , Restas tutkore amike kaj frate Via PREZIDANTO de TOLE : Prof. Bojidar Leonov

**Mesag'o de islama esperantisto**
Bonan Tagnokton! Chiuj Membroj de UEA.

# ISLAMO

Vocho de la Islamo Asocio (VIA) (Ni volas kunlabori kun UEA ekde 9 Feb. 2004): Domo N-

ro.4E 638 Orangi Town, Karachi N-ro.41 Pakistan. Telefono (92-21) 4937221 au Porteblafono (92-030) 6279207 Telefekso (92-21) 4933559 Retposhta: illias@super.net.pk <http://www.can-you answer.com/CanBahaisAnswer/bahaiFrame.htm>
Prez. :Abid Ali Kaim Khani, Retposhta : abidkk77@hotmail.com

# CELO

Mi estas eks Bahaano. Mi farighis la Islamano per artikolo de Iljas Sattaro "Chu Bahaanoj Pavas Respondi?". Mi volas Diskonigi Islamismo inter esperantistoj kaj Esperanto inter Islamanoj.

## INFORMOJ DE HENRI MASSON

**From:** Henri Masson [espero.hm@club-internet.fr]
**Sent:** Friday, March 26, 2004 10:45 AM
**Urgxa agado cxe viaj parlamentanoj en Bruselo**
la euxropa parlamentano G. Dell'Alba reprezentis hodiaux sub la numero "Dell'Alba A5 1543/04", sian amendon al la raporto pri multlingveco, Raporto 2003/2227 REG . Temas pri reenkonduko de la frazo forvisxita dum la antauxa enkomisiona vocxdonado: Gxi tekstas (en grandaj literoj estas la reenmetita frazo): Konsiderante ke la pripensado pri la plej bonaj rimedoj por konservi la malsamecon kaj la ricxecon kulturan kaj lingvan de Euxropo devos dauxri, PRECIPE PER EKZAMENO CXU LA PARALELA ENKONDUKO DE NEUXTRALA PIVOTA LINGVO, KIEL EKZEMPLE ESPERANTO, NE POVUS KONTRIBUI AL PLU-KONSERVADO DE EKZISTANTAJ LINGVOJ, KAJ SAMTEMPE EVITI KE UNU AUX LA ALIA DE CXI TIUJ AKIRO ROLON NE NUR PLI GRAVAN SED TIAN, KE GXI ENTUTE SUPERREGOS LA ALIAJN LINGVOJN, Gxis cxi tiu momento 15 parlamentanoj deklaris sian subskribon de tiu amendo. Por ke la amendo entute estu akceptita ni bezonas 32 subskribojn g'is venonta lundo je la 19-a horo posttagmeze. Entute, do, mankas 17 subskriboj. La tagoj ne estas tre oportunaj pro la semajnfino kaj la kunsido lunde posttagmeze en Strasburgo. Tamen nun necesas urgxe agi. Bonvolu skribi rete al euxropa parlamentano de via lando en via lingvo kaj peti lin tuj anonci rete sian intencon subskribi al la oficejo de G. Dell'Alba, cxe s-ro Paolo Atzori <patzori@europarl.eu.int> aux s-ino Isabella Marzullo <imarzullo@europarl.eu.int> aux telefone: +32 22 84 33 06. La oficejo poste okupigxos pri fizika kolektado de la subskriboj en Bruselo vendrede la 26-an aux en Strasburgo lunde posttagmeze la 29-an. Se vi ne konas la ret-adreson de viaj parlamentanoj vi povas sercxi ilin per la reto en pluraj manieroj, sed gxenerale ili estas de cxi tiu formo:
NAPOLITANO, Giorgio <GNAPOLITANO@europarl.eu.int>
ALMEIDA GARRETT, Teresa <TALMEIDAGARETT@europarl.eu.int>
BARÓN CRESPO, Enrique <EBARONCRESPO@europarl.eu.int>
BONDE, Jens-Peter <JPBONDE@europarl.eu.int>
do la unuaj literoj de la persona nomo sekvataj sen punkto de la familia(j) nomo(j). Bonvolu SKRIBI RETE TUJ, doni la esencajn ADRESOJN JE KIUJ ILI ANONCU SIAN INTENCON SUBSKRIBI, kaj SKRIBI MALLONGE. Mesagxoj pli longaj ol 10-15 linioj ne nur ne estos legataj de la parlamentano sed tre malversxajne ecx ne de la sekretario. Dankon ankaux nome de Sean O'Riain, prezidanto de Euxropa Esperanto-Unio.

## KANZONOJ KAJ HUMORAJ”OJ

**LA TAGO DE PATRINOJ: 2 MAJO 2004**
La redakcio de HeKo salutas chiujn patrinojn en la mondo per la suba poemo de Attila József, esperantigite de Kálmán Kalocsay:

**"Mia patrino"**
Shi tenis tason ambaumane
dimanche chirkau la vespero
kaj mute shi ridetis, iom
sidante en duonkrepusko --

Shi en poteto hejmenportis
de l' ekscelencoj vespermanghon,
ni enlitighis kaj mi revis,
ke tiuj manghis marmit-plenon --

Patrinjo, eta, frue mortis,
char lavistinoj frue mortas,
piedoj tremas de sharghporto
kaj kap' doloras de gladado --

Montpejzagh' - la tolajh' malpura!
Nervtrankviliga nuboludo
estas vapor', kaj klimat-shangho
por lavistin' la subtegmento --

Mi vidas: kun gladil' shi haltas.
Shin, fragilkorpan, kapitalo
rompadis, pli kaj pli maldikan --
pripensu tion chi, proletoj --

Pro lav' kurbetan, mi ne sciis
shin juna virinet'. En songho
shi portis puran antautukon,
poshtisto tiam shin salutis --"

<u>**Paca Kanzono**</u>
**Ekkiam regos am' sur ter'**
Alvenos tagoj sen malsato;
Ne plu premegos la mizer'.
Sed ni jam estos mortaj, frato!
Kaj kiam regos am' sur ter'
Trubadorigxos la soldato;
For la milit' for la karcer'.
Sed ni jam estos mortaj, frato!

En la longega vivocxen'
En kiu pelas nin la sort',
Al cxiuj viv', al cxiuj mort',
Nin trafis nur sufero kaj cxagren'.

Sed kiam regos am' sur ter'
Cxu restos iom da kompato
En tiuj tagoj sen mizer'
Por ni, de longe mortaj, frato?
Ni, kiuj en temp' de sufer'
Kaj de milit' kaj de malsxato
Sercxadis pacon sur la ter'
Sed kiun ili gxuos, frato.

En la grandega vivolud'
Finigxos bele la parti';
Sed la perdantoj estu ni.
Jen tie cxi plej sagxa la konklud'.

Sed kiam regos am' sur ter'
Cxu restos iom da kompato
En tiuj tagoj sen mizer'
Por ni, de longe mortaj, frato?

**ANEKDOTOJ EL SHKODER-ALBANIO**

**Pardonpeto**
Post longtempa kverelado la edzino forlasas la hejmon kaj iras al s'ia patrino. S'i revenas post tri monatoj.

- C’u vi pardonos min pro la forlaso, mia kara?-petis la edzino sian edzon.
- Mi pardonas vin pro la forlaso, sed ne pro la reveno!

**Suspekto**
- Au’skultu, kara edzo!- S’ajnas al mi ke vi flirtas kun fremdaj edzinoj.
- Ne, mia stultulino. Mi apenau’ flirtas kun tiuj enlokaj- senkulpigis sin la edzo.

**La homo mortas nur unufoje**
-Kiel tio eblas? Estinte fianc’ita vi estas dirinta ke vi pretas morti por mi, dum nun..
- Nu, la homo mortas nur unufoje..

**Klarigo**
Junulo renkontis la patron de lia amantino kaj petis de li permeson por geedzig’i.
-Antau’ ol decidi- diris la patro mi devas konvinkig’i ke mia filino ne kunvivos apud stultulo.
-Ne zorgu pri tio, ni kunvivos tre malproksime de c’i tie.

**Tuso**
Dum promenado la edzino tusis de fojo al fojo.
-C’u via edzino malvarmumis-diris iu konato renkonte al la geedza paro.
- Ne s’i estas sanig’anta- respondis la edzo.- Ankorau’ ne ac’etinte la robon s’i estis malsana, nun s’i tusas por atentigi sin.

**Kie estis la kapo**
Kolerigite pro sia edzino, edzo malbenas:
-Al diabolo! Mi ne povas rememori kie estis ja mia kapo tiun malbenitan momenton kiam mi decidis geedzig’i kun vi.
-Mi diras –intervenis la edzino- tio estis sur mia brusto.

**Geamantoj**
Junulo suspektanta por sia amantino petis s’in:
C’u veras ke mi estas via unua amanto?
- Sendube jes, mia kara. Estu certa je tio. Vi ec’ estas la plej simpatia inter ili.

**La vera kau’zo**
Edzino kolerigite al la edzo, iutage estis kriante:
-C’u vi vidas tiujn c’i meblojn? Se ne estus mia mono, ili ne estus c’i tie. Ankau’ la au’to, sen mia mono ne estus c’i tie. Ec’ la domo, sen mia mono..
- Sen via mono ankau’ mi ne stus c’i tie- interrompis s’in la edzo.

**Paloka**
En ric’a familio el Shkoder servis viro nomata Paloka. Oni kulpigis lin pro c’io malagrabla okazinta en la hejmo. Ekz. Ono forgesis la kuiraj’on sur forno , pro tio kulpis Paloka, rompig’is io- denove oni kupigis paloka-n, falis surteren iu el la gefiloj, la kulpo estis c’e Paloka..
Ununokte la dommastrino estis ege maltrankvila kaj movig’is rapide tra la hejmo.
- Kio okazis sinjorino-petis s’in Paloka.
- Nenio, Paloka, la novedzino estas naskanta bebon.

- - Oh, mi povrulo! Ankau' pri tio oni kulpigos min- kriis Paloka.

**Propono**
-C'u vi akceptus ke mi farig'u la suno de mia vivo?
-Certe jes. Mi estus tre felic'a trovig'i je 150 milionoj da kilometroj for de vi.

**<u>EL LA DIPLOMLABORAJ"OJ DE NIAJ GESTUDENTOJ</u>**

**Purpuraj kodikoj de Berat, Albanio**
En VI jarcento aperas la unua purpura kodiko kie estas amtempe unu el la pli fruaj kodikoj je mondskale Beratinus 1. Parto de evangelia teksto en g'i konistigas la familion de evangelioj grandlieraj. Ne estas en g'i dekoraciaj'oj sed nur skribaj'o, havanta la stilon de aplikata arto. Estas farite el solvita arg'ento, dum la grandaj inicliteroj estas el oro. Tie entenig'as 2 evangelioj, unu lau' Mateo kaj la alia lau' marko, entute en 190 folioj el rug'a pergameno.
La metala dekoraciita kovraj'odatig'as el la jaro 1804. 9 el g'iaj volumoj estas restau'rigitaj en C'inio en la jaro 1972. Kelkaj sciuloj opinias ke g'i apartenas al la skolo siria-palestina. En IX jc aperas Codex Aurens Anthim, skribita per solvita oro sur rug'aj pergamenoj. G'i akiris tiun nomon honore al la episkopo Anthimio Aleksudhi kiu estas konservinta g'in. G'i estas unu el 7 purpuraj kodikoj ankorau' konservitaj je mondskale (du tiaj estas en Albanio). G'i enhavas 4 kompletajn evangeliojn, entute 420 foliojn je formato 24 cm X 19 cm.
Ekde X-XV jarcentoj aperas 90 kodikoj el kiuj 45 estas en pergameno (10 en oro kaj arg'ento) kaj 35 en tolaj'o. Ili estas skribitaj en la greka lingvo. Ili donas informacion pri la bizanca muziko, pri la ekonomia kaj socia vivo, pri tiuj kiuj mendis ilin,pri la skribintoj de la donitaj'oj. Ili havas miniaturojn kun koloroj je motivoj el flau'ro kaj fau;no kaj angelecaj figuroj servantaj por krei la ikonojn kaj afreskojn.

En Berat estas konservitaj la monumentoj de la manuskriptoj. La plej grava el tiuj estas la Purpura Kodiko skribita en VI jarcento per rug'a koloro. G'i enhavas fragmentojn el la Evangelio lau' Mateo kaj Marko. Estas malkovrita en la jaro 1868, pristudita kaj eldonita de la franca esploristo P. Battifal en la jaro 1884. Prikonsiderante la tempon kiam g'i estas kompilita (IV jarcento) g'i konsistigas unu el kvin kodikoj je mondskale.